

Esperanto en Skotlando

*Esperanto in Scotland - Esperanto ann an Alba
Somero 2012 - £2/€2.50*



Hju Rid: Ĉu “VENKO” fine eblas?

*Ankaŭ en ĉi tiu numero: Thomas Carlyle,
Thomas Urquhart, Gražina Opulskienė
kaj Jakvo Schram*

Esperanto en Skotlando

Numero 199 – Somero 2012 – ISSN 0014-0643

Redaktoro: Ed Robertson
Helpredaktoro: Hju Rid
Administranto: Mia Casey

Redakcia adreso: 52 Easter Drylaw
View, Edinburgh, EH4 2QP
Telefona: 07970 156549
Rete: ed.robertson@esperanto.org.uk

La redakcio bonvenigas kontribuantojn ĉiaspecajn: artikolojn, novelojn, novaĵojn, recenzojn, poemojn, leterojn, ktp. Limdato por la venonta kajero de *Esperanto en Skotlando*: 14a de septembro 2012. Oni prefere sendu kontribuantojn elektronike kiel simplan tekston aŭ uzante la formaton OpenOffice.org Writer (senpage havebla de la koncerna retejo). Dokumentoj en la formato Microsoft Word ankaŭ estos akceptataj. *Esperanto en Skotlando* uzas la tiparon Gentium, kiu subtenas kaj la tradiciajn esperantajn diakritojn kaj tiujn de ĉiu alia latinalfabeta skribsistemo (vizitu <http://scripts.sil.org/Gentium> por deŝuti la tiparon). Se la formato aŭ tiparo uzata en via kontribuo ne subtenas ĉapelitajn literojn, diversaj surogataj sistemoj estas akcepteblaj.

Enhavo

Hju RID: Ĉu “VENKO” fine eblas?	4
Gražina OPULSKIENĖ: “Wheesht, ye glaikit eejit” - Lockerbie 2011	10
Máire MacAOIDH: Lockerbie-Hajkoj	19
Garbhan MacAOIDH: Thomas Carlyle	20
Jakvo SCHRAM: Bildoj de Edinburgo - Kunkongreso 2012	23
El la redakcia rubujo	26
Ed ROBERTSON: Thomas Urquhart - tipa Skoto - plena je kontraŭdiroj	28
Nekrologoj: John Francis kaj Jack Casey	39
Kalendaro de venontaj eventoj	44

La opinioj esprimitaj en *Esperanto en Skotlando* ne nepre kongruas kun tiuj de *Esperanto en Skotlando* aŭ EAS. *Esperanto en Skotlando* estas publikaĵo de la

Esperanto-Asocio de Skotlando

Prezidanto: David Hannah
Vic-Prezidanto: Francesco Maurelli
Sekretario: David Bisset
Kasisto: David Hannah

Adreso: 47 Airbles Crescent,
Motherwell, ML1 3AP.
Telefona: 01698 263 199
Rete: secretary@skotlando.org

El katedro



Redaktora Komento

KER-Ekzamenoj

For a change, I've decided to write this issue's editorial in English. You may have heard the term **KER-Ekzamenoj** mentioned recently in Esperanto websites and publications. So what are these exams then? **KER** stands for **Komuna Eŭropa Referenc-kadro**, or in English: **Common European Framework of Reference**. This refers to a scale of relative proficiency in mastering a language, sponsored by the **Council of Europe**, intended to be common across Europe, and which is increasingly also used elsewhere.

The framework, or scale, consists of 6 levels of attainment: **A1, A2, B1, B2, C1** and **C2**. These levels describe knowledge and capabilities ranging from beginner (**A1**), up to those that might be expected from a native or near-native speaker (**C2**), and are also a standard which can be used to gauge different levels of competence that might be expected from examination candidates, and knowledge covered in corresponding levels of courses.

So what does this mean for speakers and learners of Esperanto? A recent development is that **internationally-recognised** versions of **CEFR** examinations are available for Esperanto at levels **B1, B2** and **C1**. These are validated by the Hungarian state-accredited **Foreign Language Examination Centre (ITK** in Hungarian), part of Budapest's **Eötvös Loránd** University. In Hungary, thousands of candidates are tested each year in a “bilingual” (i.e. Hungarian/Esperanto) version of the Esperanto exams, but now Esperanto-speakers anywhere else can take an Esperanto/Esperanto version of the exams for the same prestigious qualification.

Up until recently, the only qualification available in Scotland has been the **Esperanto Association of Britain Diploma**, and previously there was also a **GCSE** available in England. Now you can get two qualifications for the price of one, as **EAB** has decided to award its **Diploma** to candidates successful in both the oral and written examinations at level **C1** of the **KER-Ekzamenoj**. For study materials and details of what's involved, have a look at the edukado.net website, and if you think you're ready and up for it, contact me directly at ed.robertson@esperanto.org.uk for details of examination sessions that are planned in Scotland (or at Esperanto Congresses elsewhere, if you fancy a holiday).

Ed ROBERTSON

Ĉu VENKO fine eblas?

Ŝajnas al mi ke la plej granda ŝanco por plena sukceso de Esperanto venos kiam ni Esperantistoj traktos la lingvon kaj ĝian utilon kiel eble plej realisme. Tio signifas ke ni pensu ne reveme, ne idealisme, ne propagandeme, sed honeste, racie, kaj inteligente.

Depost la invento de la lingvo abundis en nia movado tro da romantikaj ideoj, romantikaj esprimoj kaj romantikaj sintenoj. Zamenhof mem, kiu plej racie kaj pragmate kompilis kaj lanĉis Esperanton, ne estis imuna kontraŭ emociaj troigoj. Kvankam la sentoj esprimitaj en “Ho Mia Kor!” estas kompreneblaj al ni de Esperanto jam konvinkitaj, ili simple ne persvados modernan menson.

La maniero laŭ kiu ni prezentu Esperanton al la mondo meritas longan seriozan kaj, super ĉio, inteligentan debatadon. Antaŭ tiam, tamen, ŝajnas al mi prudente ke ni konsideru “Kiun celon ni volas trafi?” Domo dividita en si mem, diras la proverbo, baldaŭ disfalos. Nenia ajn diskuto pri strategio kaj taktikoj povas esti sukcesodona se ni ĉiuj strebas al malsamaj celoj. Multaj celoj vivas en la mensoj de la Esperantistoj. Iuj volas nur ĝui la fenomenon, kia ĝi estas, sen tro strebi al propagando. Aliaj kun religia ardo tenas alta la sanktan torĉon en ĉiu ebla situo. Ne eblas en malgranda spaco trakti ĉiujn esperojn de la Esperantistoj. Do, el la multaj eblaj celoj kiujn subtenas la diversaj Esperantistoj, mi volas trakti tiun, kiu plej ofte bildiĝas en la mensoj egale de novaj Esperantistoj kaj de dumvivaj Samideanoj: La finan venkon.

Ni ĉiuj revis, ĉu ne, pri kiel bele estus se nur ĉiu homo en la mondo lernus Esperanton? La malfaciloj kaŭze de la lingva ĥaoso malaperus. La konfuzoj, la frustruoj, eĉ la danĝeroj, ne plu ekzistus, ĉar rekta komunikado inter malsamlingvanoj povus tuj okazi. Nu, bone; kompreneble, jes. Se ĉiu mondano ja studus nian lingvon dum, ni diru du jaroj, aŭ almenaŭ sufiĉe longe por atingi respektindan esprimokapablon, ja estus malfacile imagi la problemojn kiujn la moderna mondo frontas multfoje en ĉiu tago. Sed ĉu ni ne paŭzu momenton por pripensi la aferon de tute konkreta vidpunkto. Ĉu ni ne, dummomente, flankenmetu la idealojn, kaj tuŝu nur simplajn konkretajn faktojn.

Antaŭ ol komenci tamen, unu aferon ni devas trakti kaj priforgesigi; nome la Universalan Kongreson de Esperanto. En ĉiu jaro ie en la mondo okazas Universala Kongreso. Dum tiu mirinda evento ni celebras nian unikecon. Ni banas en la varma ĝojo de tio ke nur ni, fakte, el ĉiuj homoj en la mondo, povas kongresi perfekte sukcese sen la ĉeesto de armeo de interpretistoj. Sed atentu. Kiam ĉiuj en la mondo parolos Esperanton, ni ne plu estos unikaj kiaj ni estas nun, ĉar ĉiuj aliaj homoj en la mondo scipopos Esperanton. Esti Esperantisto ne plu estos unikaĵo. Esperantisto estas tiu kiu scipopos Esperanton, kaj post la fina venko, ĉiu homo estos Esperantisto.

Ni devas, do, konsideri ĉu okazas kongresoj de anglalingvanoj, kiuj kunvenas ne por diskuti ian ajn specifan temon, sed nur por la plezuro paroli la anglan kaj paroli pri la angla? Ĉu okazas kongresoj de ne-anglalingvanoj kiuj faras la samon? Kompreneble ne. Tial la daŭra ekzisto de Universalaj Kongresoj estos en la erao PFV (post fina venko) konsiderata bizarĵo ĉeestata de elcentremuloj, stranguloj, kaj fanatikuloj. Iasence, ni Esperantistoj celas la nuligon de tio kion ni kune ĝuas kaj celebras.

Do forgesinte pri tio, nome la Universalajn Kongresojn kaj la unikecon de esti Esperantisto, ni faru Gedankeneksperiment, tio estas penso-eksperimenton. Albert Einstein estis unu el tiuj en la moderna epoko kiu famigis la penso-eksperimenton kiel ilon por rigora racia esploro de la implicoj kaj ŝajnaj kontraŭdiroj de sia Teoria de Relativeco. Alia estas filo de Edinburgo, James Clerk Maxwell. La diableto de Maxwell ŝajne ebligas maŝinon de eterna moviĝo.

Ni Esperantistoj sekvu la ekzemplon. Ni starigu fantazion pri la estonteco sed ni traktu ĝin per rigore realismaj kriterioj. Ni imagu ke ĉiu homo lernos Esperanton en, espereble ne tre fora estonta tempo dum siaj lernejoj. En ideala mondo tia lernado okazu en la lastaj du jaroj de elementa instruado antaŭ la aĝo dek du. Depost tiam la lernado de fremda lingvo fariĝas des malpli facila. Modernaj esploristoj pri lingvolernado sukcesis montri ke infanoj tre facile lernas lingvojn inter la aĝoj du ĝis dek du. Por la planantoj de edukaj sistemoj estas klare sencohave espluati tiun naturan trajton de la infana menso. En nia ideala mondo de la estonteco – tio estas planedo Tero PFV – infanoj lernos sian unuan fremdan lingvon inter la aĝoj du ĝis dek du.

Sed se tio ne eblas ni ne malesperu. Esperanto ja estas tia, ke ĝi lerneblas pli facile ol aliaj lingvoj eĉ por mezlernejoj. Multaj el ni lernis Esperanton multajn jarojn post la lernejaj jaroj kaj ja bone sukcesis. Ni starigas, tamen, idealan penso-eksperimenton, do ni imagu ke ĉiu infano lernos Esperanton antaŭ la fino de la mezlernejaj jaroj.

Ĉu tamen niaj revoj ne tuj frontas la unuan disreviĝon? Kiom da homoj en nia ideala estonteca mondo ja ricevos eĉ bazan lernejan edukon. Laŭ nunaj statistikoj nur dudek sep procentoj da infanoj en la nuntempa mondo ricevas ian ajn lernejan instruadon. Tio signifas ke sepdek tri centonoj de la homaro, tio estas pli ol du trionoj, ne ricevas lernejan edukon. Konsekvence, kvankam tiuj sepdek tri centonoj supozeble havas normalan inteligenton kaj kapablas paroli sian denaskan lingvon, ili ne povas legi ĝin nek skribi ĝin.

Tio ĉi ŝajnas al mi de etika vidpunkto la plej granda ŝtumbloŝtono de niaj revoj por nia sankta lingvo Esperanto. Ni volas kampanji por la inkludo de specifa eduka lernobjekto por ĉiu homo en la mondo antaŭ ol kampanji por la eduko en kiu povas kuŝi tiu lernobjekto.

Ĉiu homo en la mondo rajtas ricevi minimuman edukon. Tiu estu la kapablo legi kaj skribi sian denaskan lingvon. Tia minimuma eduko devas esti certigita, miaopinie, ĉie en la mondo antaŭ ol ni pensu pri lernigo de Esperanto al la homaro; se ne, ni perfidus la celon de Esperanto. Memoru ke ni, dum longa tempo, proklamadis ke Esperanto estu la unua dua lingvo de la homaro; ke ĝi ne anstataŭigu la naciajn lingvojn. Do, se homo ne povas legi nek skribi en sia denaska lingvo, kiuj estas ni por insisti ke tiu unue lernu nian lingvon? Ne; kiel respektohavaj homoj ni defendu homajn rajtojn kaj ni insistu male, ke ĉiu edukiĝu en sia denaska lingvo, kaj nur poste tiu lernu la nian.

Klare, sub tiu kondiĉo, la vera fina venko simple ne povos okazi ĝis venos la utopia tago kiam ĉiu infano en la mondo ricevos edukon. Por atingi tiun tagon ni devos dependi de faktoroj kiuj kuŝas ekster la manoj ne nur de la Esperantistoj, sed ekster la manoj ankaŭ de la granda plejmulto da homoj sur la planedo Tero. Ni estas do senhelpaj. Ni devas nur pacience atendi la alvenon de justeco en nian mondon.

Kion ni do faru intertempe? Mi asertis en la komenco ke ni estu realismaj. Ni devas revizii nian revon kaj limigi ĝin nur al tiu minoritata parto de la homaro kiu jam havas edukon. Ni pensu anstataŭe, do, pri estonteco en kiu almenaŭ ĉiu edukita homo lernos iam dum siaj lernaj jaroj Esperanton. Tio estus fina venko – iom reviziita de vera tra la mondo fina venko, sed tamen fina venko. Ni pensu do pri homoj kiel ni, Eŭropanoj, Japanoj, Usonanoj, kaj tiel plu, homoj el la riĉaj landoj en kiuj ĉiu ricevas edukon.

Ni imagu, do, ke ĉiu tia homo scipovas Esperanton.

La kondiĉoj por nia penso-eksperimento estas nun starigitaj. Ni povas nun esplori demandon. Ni demandu al ni “kiam homo en nia fantazia estonteco uzos Esperanton?” Alivorte ni demandu al ni “kiam tia homo renkontos malsamlingvanon?”

Mi listigos du situaciojn en kiu homo scipovanta Esperanton povos uzi ĝin.

La unua situacio estas en la ordinara vivo. Por trakti tiun situacion pensu pri via propra normala vivo. Vi, farante la ĉiutagajn aferojn kiel laboron, butikumadon, sociumadon ktp, renkontas homojn kiuj parolas ... la nacian lingvon! Pro tio, ĝi estas efektive la nacia lingvo. Pro tio vi ne bezonas Esperanton en via normala ordinara vivo. Vi bezonus Esperanton nur se hazarde vi renkontus iun kiu ne parolas vian denaskan lingvon. Kiom da fojoj, ene de via hejmlando, vi renkontis eksterlandanon kies rego de la nacia lingvo ne sufiĉas, aŭ tute mankas, tiel ke vi pensis “Ho, se tiu nur scipovus Esperanton”? La respondo devas esti – certe estas por mi – tre tre malmulte da fojoj. Do, por la grandega plejmulto el ni, eĉ por ni Esperantistoj, la normala ordinara ĉiutaga vivo ne bezonas Esperanton.

Ni estu, do, brutale honesta pri tio ĉi. En la estonteco, eĉ kiam la maksimuma ebla nombro da homoj scipovos Esperanton, la normala vivo apenaŭ bezonos ĝin. Estas do malfacile elpensi argumenton por la instruado de Esperanto al ĉiuj homoj kiel ni, se la probableco de ĝia uzo en la ties vivoj estas proksimume nula. Jen do la defio al ni Esperantistoj: elpensi argumenton favora al la instruado de Esperanto kiu frontas tiun ĉi realan situacion ke, lerninte ĝin, oni fakte tre malofte uzos ĝin.

Dua situacio en kiu ordinara edukita persono povus bezoni Esperanton estas dum ferio eksterlande. Proksimume 20% da britoj ferias eksterlande. Por tiuj la ebleco paroli en lingvo facile komprenata de la lokuloj estus treege utila. Imagu do ke la Britoj kaj la lokuloj en la lando de la ferio parolas Esperanton. Dum ferio la feriantoj renkontus enlandajn gekelnerojn, taksiistojn, aŭtobusŝoforojn, butikajn gevendistojn ktp. Ili parolus al tiuj en Esperanto. Esperanto estos utila ĝis la grado ke la lokuloj ne jam parolas la lingvojn de la vizitantoj. La uzo de Esperanto estus, do, pli granda malŝarĝo por la lokuloj ol por la vizitantoj.

Kompreneble, feriantoj renkontos aliajn feriantojn. Nu, ĝis la grado kiom oni emas societumi kun nekonatoj dum ferio, komuna lingvo estus ja utila. Ĝi efikus al pli societema kaj konsekvence pli ĝuinda ferio, eĉ por ordinaruloj. Sed multaj homoj emas teni sian propran kompanion dum ferio kaj eĉ la plej gregemaj homoj ne volas grupiĝi kun nekonatoj la tuton tempon. Do jen ĉio, almenaŭ por 20% el la popolo, po du semajnoj en jaro.

Krom la ordinaruloj, kiuj aliaj homoj renkontas eksterlandanojn sufiĉe ofte por fari Esperanton utila? Jen mi listigas tiujn, kiujn mi povis elpensi (la ordo ne spegulas la gravecon):

1. Gejunuloj kiuj vojaĝas tra la mondo dum la “paŭzjaro” inter lerneja kaj universitata studoj. Klare, por ili, ebleco uzi Esperanton kie ajn dum sia vojaĝo solvus multajn el la foje danĝeraj problemoj, kiujn tiuj homoj povus renkonti. Temas pri unu malgranda grupo da homoj dum unu jaro de la vivo.
2. Diplomatoj kaj ĉiuj, kiuj ebligas la intertraktojn de la registaroj de la landoj. Tiuj certe konsistigas grandan armeon, kaj povus renkonti eksterlandanojn en ĉiu tago. Sed kvankam granda armeo, ĝi tamen estas malgranda proporcio de la popolo.
3. Parlamentanoj de Eŭropo. Sed mi ne dubas ke tiuj povos uzi eĉ Esperanton por konfuzi kaj trompi la popolojn. Do, ĉe Eŭropo, Esperanto ne donos avantaĝon!
4. Homoj kiuj devos labori dumtempe en alia lando; por ili, klare, Esperanto povus esti vivosavilo.

5. Homoj kiuj enmigras en aliajn landojn. Klare en la komenco Esperanto estus nemankinda helpo. Sed, se oni ne lernus la nacian lingvon, oni ĉiam restos iom aparta de la socio, ĉar ĉio okazas en la nacia lingvo. Televido, radio, teatro, ĵurnaloj, libroj ktp, estas en la nacia lingvo. Plej grave la infanoj neeviteble akiros la nacian lingvon kaj popaŝe formetos la patrolandan. Nur se oni intence volas resti fremdulo oni ne lernos kaj uzos la enlandan lingvon. Se oni vere ne volas lerni ĝin, la scipovo de Esperanto fare de kaj la enmigrinto kaj la lokuloj sendube mildigus la vivon por la enmigrinto kompare kun la nuntempo.
6. Internaciaj bonfaraj organizoj ŝparus multan monon se ili povus maldungi ĉiujn interpretistojn kaj tradukistojn. Per tio ili povus inversigi la proporciojn da mono elspezata je traduko kaj bonfaro, je pozitiva kresko de la proporcio por bonfaro. Eĉ senkonsidere de aliaj grupoj, la bonfaraj organizoj devas hodiaŭ, pro moralaj kialoj, akcepti Esperanton.
7. Kompanioj kiuj komercas internacie. Mi jam plurfoje argumentis pri la graveco de la uzo de Esperanto en komerco, do mi ne ĉi-foje faros.

Do, rigardante al tiu listo ne estas facile pensi ke Esperanto estos ĉiutage grandskale uzata eĉ en mondo kies edukitaj homoj scipovos ĝin. Klare ĝi estos serioze uzata multe pli regule kaj ofte ol nuntempe. Sed la homoj kiuj ja bezonos ĝin konsistigas nur etan proporcion de la tuta popolo. El la tuta popolo nur ĉirkaŭ 20% uzos ĝin en ferio dum du semajnoj de la jaro. Tio ne estas diri ke, pro tio, ne taŭgos instrui Esperanton, ĉar nuntempaj lernejoj instruas eĉ malpli utilajn lingvojn!

Do en konkludo, mi ne havas konkludojn. Mi simple volis pensigi homojn pri la verŝajna realo de fina venko. Kia ĝi estos? Kiom da homoj uzos Esperanton PFV. Ĉu eblas el la bildoj kiujn mi prezentis elĉerpi elementojn kiujn oni povus prezenti al edukistoj, politikistoj kaj la publiko kiel dezirindajn por konvinki ilin pri Esperanto?

Se ne, ni raŭmu.

Hju RID

“Wheesht, ye glaikit eejit!”

Ĉu mi estis kuraĝulino kiam mi jesis, ke mi emas alveni al la mistera Skotlando kaj ĉeesti la skotan kongreson en Lockerbie? La mención de tiu urbeto ofte akompanas la vorto “tragedio” kaj Skotlando entute ŝajnas plena da fantomoj kaj sekretoj... Tute ne kuraĝulino, ĉar mi donis la principan konsenton ne sciante en kia loko ĝi okazos kaj eĉ poste mi ne memoris, ke en Lockerbie pro terorisma atako en 1988 falis aviadilo kaj pereis multaj homoj. La mistero de Skotlando ankaŭ fontas de rakontoj pri Nessie, sed mi supozis, ke mi ne estos proksime al tiu monstro. Mi jes havis en mia memoro la bonegajn impresojn de Kreŝo kiu estis gastpreleganto antaŭ kelkaj jaroj kaj mi aŭdis tre pozitivajn pritaksojn de Jakvo kiu prelegis en 2010 dum skota kongreso. La fakto, ke mi iom konis du skotajn esperantistojn ankaŭ estis kuraĝiga, ja mi konis David Kelso kaj Ed Robertson, du gajajn kaj simpatiajn ulojn. :-)

Tiamaniere la 10an de junio mi forlasis Litovion kun varmego de +32°C kaj post kelkhora flugo en Prestwick ekvidis ridetantan Ed. Temperaturo estis nur +14°C, sed ne estis malvarme, nur agrable freŝe. Ni promenis kelkajn horojn en Glasgow kie plaĉis al mi la esperante verda statuo de Donald Dewar kaj la malnova urbodomo kiun ni iom vidis eĉ de interne. Gustis la unua mia skota biero kaj entuziasmigis la ebleco foti virojn en kilto: tio estis la stratmuzikistoj. Atendante trajnon al Lockerbie mi rigardis ĉiuflanken per larĝe malfermitaj okuloj kaj rimarkis, ke la plimulto da skotoj havas iun specialan manieron por vesti sin. Ŝajnas, ke ĉefe gravas ke la vestaĵoj estu oportunaj, poste gravas ke la vestaĵoj estu oportunaj por prizorgi ilin kaj trie gravas ke la vestaĵoj estu oportune esprimantaj individualecon. Ege plaĉa maniero por mi, ja aspektas ke skotoj fajfas pri malpraktikaj vestaĵoj, eĉ se ili estas ege modaj.

De la unua vido Lockerbie memorigis iun filmon pri malnova Skotlando. Ruĝbrikaj domoj, nur kelkaj stratoj, ĉefplaco malgrandeta kaj ĉarma, fervoja stacidomo kaj kelkaj preĝejoj, kelkaj trinkejoj kaj multaj hoteloj de kiuj la plej bela kaj la plej proksima al la ĉefplaco estis la nia *King's Arms Hotel*. Afable akceptitaj de hotelistoj ni eĉ ne elpakis la valizojn kaj tuj iris

al la vespermanĝo kiu en Skotlando, kompreneble, nomiĝas “tagmanĝo”. Por mi tio estis ankaŭ interkona vespero, ĉar mi la unuan fojon renkontiĝis kaj persone konatiĝis kun la ĉeforganizantoj Jean kaj David, subaŭskultis la interparolon de Geoffrey kaj Hugh kaj ridegis kiam Girvan MacKay diris al sia kara Maire: “Ĉu vere Jakvo pravis kiam li diris, ke skotoj ĉe la tablo ĉiam parolas nur pri gramatikaĵoj?” Mi ne enuis, sed pri gramatikaĵoj oni vere volonte kaj multe babilis. Mirigis min, ke Geoffrey multege memoris pri Litovio de lia vizito al mia lando, eĉ nomoj restis en lia kapo! Tre agrabla surprizo estis, ke ĉiuj kun kiuj mi paroletis aŭ kiujn mi aŭdis bone parolis Esperanton kaj neniu krokodilis. :-)

Post abunda kaj bongusta manĝo sekvis du prelegoj. Mi sentis min ege malstreĉita, ĉar mi ne devis tiun vesperon ion prezenti, mi estis tre sata kaj en varmo post longeta vojaĝo kaj mi eksidiĝis plena da atento en komforta kaj bela salono de la hotelo por aŭskulti la prelegon pri Thomas Carlyle de Girvan. Mi iom sciis pri tiu fama filozofo kaj legis litove kelkajn aforismojn vaste konatajn, sed estis interese aŭdi ankaŭ pri lia vivo, rilatoj kun edzino kaj liaj verkoj. Laŭ programo estis ankaŭ la dua prelego, pri Robert Burns kaj ĝi estis akompanita per kunkantado. Surprize mi konstatis, ke tiu popularega “skota popola kanto” pri amikoj kiu tostas ĝuante junajn tagojn estas laŭ la versoj de Robert Burns. Eble dum iu kvizo mi povos ekbrili per tiu scio? :-)

Programeroj finiĝis kaj kompreneble ni devis iri ien por trinki! Tim sugestis, ke ni sekvu lin kaj Clare. Estis bele paroli kun junaj esperantistoj kiel Laura kaj Andrew, aŭskulti Tim kaj Ed, sperti, ke trinkaĵojn mendas unu persono por la tuta rondo kaj la sekvan rondon mendas la alia. Mi lernis pri skotaj bieroj, ke kelkaj de ili havas nomojn ligitajn kun la prezo: ju pli forta des pli multe da ŝilingoj kaj mi trinkis tiun por 60, do eble ne la plej malfortan. :-)

Matene atendis min du surprizoj kaj ambaŭ agrablaj: la unua estis belega hundo kiu atendis ĉe la ŝtuparo de la hotelo. Nome tian hundon, de la raso “ora retrihero” mi planas akiri kiam mi pensiiĝos, tial la ĝojo vidi kaj karesi ĝin estis grandega! La dua surprizo estis matenmanĝo kiu estis enorme grandega: ovajo, fazeoloj, rostita pano kaj fritita ŝinko, ĉion eĉ ne eblas memori, nur mi memoras, ke alian tagon mi devis esti pli singarda mendante.



Urba festo en Lockerbie



Gražina prelegas pri Litovio

Dum EAS-komitatanoj kunsidis, ni tre agrable promenis tra la urbeto gvidataj de Geoffrey. Ni trankvile vizitis la urbon al ambaŭ direktoj, vidis la preparojn por la festo kiu devis esti postagmeze kaj mi daŭre fotis kaj babilis. Mi devas konfesi, ke mi speciale provis kapti per mia aparato la fotiston Michael, partneron de Dave, ĉar li mem aspektis ege originale kaj interese kiel konvenas al vera artisto! Dum iu momento, kiam ni eniris la korton de la preĝejo, mi eksentis min denove kvazaŭ mi estus en filmo kaj mi diris al Maire, ke se ni trovos la murditan pastron inter la tomoŝtonoj tiam vere mi ĉeestas mian ŝatatan “Murdoj de Midsomer”. Ŝi ridis, ke tiu serio estas konata kaj sufiĉe ŝatata ankaŭ en Britio kaj ni parolis pri aliaj filmoj kiuj vagadas samtempe tra televido de la tuta mondo. La fino de la ekskurseto estis speciale interesa por mi, ĉar Maire volis viziti bibliotekon por havi kelkajn informojn kaj mi kuniris. Mi ĉiam klopodas vidi bibliotekojn, sed tio estas verŝajne normale por la bibliotekistino? La afabla deĵorantino permesis al mi rigardi kion mi volas kaj foti kio interesas min. Tio kion mi rakontis al koleginoj post reveno estis, ke la biblioteko en Lockerbie estas vera centro de la informoj, ne nur pruntas librojn, ke tie eblas ekscii pri turismaĵoj kaj eĉ ricevi la horaron de la busoj. Ĉe ni nun iĝas modo nomi la bibliotekojn “centro de informado”, sed neniu ricevas la trafikhoraron, nur povus mem serĉi per biblioteka komputilo.

Sekvis mia prelego pri Litovio kaj je iu momento belaj rajdantoj sur belegaj ĉevaloj preterpasis la fenestrojn de la salono. Urbo prepariĝis por la festo kaj post lunĉo ankaŭ ni ĉiuj iris eksteren por vidi la paradon. Nekredeble kiam bonŝanca mi estis, ĉar iris orkestro post orkestro en naciaj kostumoj kaj ludantaj per blovflutoj, do mi povis kaj foti ĝissate, kaj iom filmeti kaj ĝui la etoson!

Tuj poste per privataj aŭtoj ni foriris al la ekskurso. La unua celo estis la naskiĝdomo de Thomas Carlyle en urbeto Ecclefechan. Pluvetis, sed ne ĝenis tiu pluvo kaj viziti la domon kiu estas tiom malnova kaj tiom bone konservita estis ege interese. Ni havis tradukon de klarigoj al Esperanto, sed mi iom enviis la junan italon Francesco kiu povis bone kompreni ankaŭ la originalajn klarigojn. Pri tiu domo en memoro restos la malgrandeco de la gepatra lito, belega ŝranko kun teleroj en la kuirejo kaj enkadrigita mesaĝo al Thomas Carlyle de famuloj okaze de lia okdekjariĝo. De famegaj nomoj tie la plej konata, almenaŭ por mi, estis tiu de Darwin.

Ni startis tuj poste al Gretna Green kiu ne estis tre proksima kaj kiam aŭto turnis al la urbeto nia simpatia ŝoforo Tim diris: “Do, Clare, vi fine sukcesis venigi min al Gretna Green, kvankam pro alia kialo”. La sencon de tiu eldiro mi komprenis nur dum la ekskurso. :-) La vetero ne permesis multe promeni, tial ni bone amuziĝis en grandvendejo kvarope kun Dave, Michael kaj Ed, jen mezurante kilton por Ed, jen elektante jakon de nacia kostumo por Michael, jen skotan ĉapon por mi, sed ni aĉetis nenion de tiuj aferoj, nur kelkajn specialajn dolĉaĵojn. Poste en grupeto ni sidis kaj trinkis atendante forirhoron kaj en mia memoro la urbeto de geedziĝoj restas freŝe lavita post pluvo kaj belega kiel bildkarto. Jam poste, kiam mi revenis al Litovio, mi legis libron de Jane Austen “Orgojlo kaj Antaŭjuĝoj” kaj je iu momento la nomo de Gretna Green aperas tie, sen klarigo aldona, ke temas pri loko kie povis geedziĝi amantoj tro junaj laŭ angla leĝo aŭ tiuj kiuj ne ricevis la benon de familioj. Mi iom fiere pensis, ke Esperanto vere klerigas, ĉar mi komprenis pri kio temas estante de fora lando...

La reveno kaj tagmanĝo estis laŭ programo, sed la manĝo estis speciala, ja mi la unuan fojon gustumis faman hagison. Ĝi estis tre bongusta, sed eĉ pli ol manĝon mi ĝuis la konversacion ĉe la tablo, ĉar nun mi jam konis iom la homojn kaj temis pri skota kuirejo, ne pri la gramatikaĵoj. Mi denove devis ridi kiam Girvan decidis mendi hagison, klarigis ege sprite: “Mi estas vegetarano, sed mi ne estas fundamentalisto” :-D

Estis iom da tempo inter la vespermanĝo kaj la prelego kaj mi reiris sola al urbo iomete promenis kaj vidis, ke ĉie estas multaj festantaj, homoj, gejunuloj kaj viroj en kiltoj. La prelego de Ed pri Thomas Urquhart estis interesa kaj tiu ulo de la 17a jarcento restis por mi same enigma kiel aspektas al mi lia familia nomo. Mi nur komprenis, ke li havis interesan vivon kaj verkis tion kion neniel eblis kompreni pro lia tro pompa stilo. Ankaŭ neniam neniu povis lerni lian universalan lingvon, ja ĝi neniam reale atingis la publikon!

La lasta programero estis lingvaj ludoj, kaj ĉar la kongresanoj ĉiuj bone parolis Esperanton ni plej bone amuziĝis kunmetante Zamenhofajn proverbojn. Mi ŝatas tiun ludon, ĉar kelkfoje homoj kreas ege logikajn proverbojn, eĉ rimajn, nur ili ne estas Zamenhofaj. Ekzemple, jam okazis de la proverboj “Kiu multe babilas, pensas malmulte” kaj “Bongusta peco longe ne atendas” oni produktis “Kiu multe babilas longe ne atendas” :-) Kvankam ni finis lingvajn ludojn nur antaŭ la dekunua, kompreneble, ne eblis tuj iri litten, kelkope ni iris al trinkejo kaj revenis jam post noktmezo.

Preterirante la hotelan trinkejon mi aŭdis la zumadon de multaj homoj kaj ĉe la verŝtablo staris du junaj kaj ebrietaj viroj en kiltoj. Ĉar ankaŭ mi ne akvon trinkis mi subite havis la kuraĝon peti ĉu ili ne konsentos, ke mi fotiĝu inter ili. La viroj tuj akceptis kaj mi havas nun belegan foton por ĵaluzigi miajn amikinojn. Kiel devas esti, litovinoj vidante tiun foton, demandas min ĉu vere tiuj viroj portas nenion sub kiltoj kaj mi diras tre memfide ke vere nenion! Kvankam kiam mi demandis pri tio Ed, li konsilis nur: “Petu kaj ili montros”. Mi ne kuraĝis peti, ja ne trinkis ion pli fortan ol unu ĝlason da 60 ŝilinga biero. :-)

Dimanĉe matene mi elprovis novan pladon; monton da fazeoloj kun saŭco, forta manĝo! Manĝtempo ĉiam estas bona okazo por bableti kaj por pli konatiĝi kaj ĉi-foje mi profitis la eblecon parolante kun Brendan kaj Sheila. Poste la kongresanoj disdividiĝis en du la salonoj: samtempe estis kaj la diservo por kredantoj kaj fiservo – alternativo por tiuj, kiujn ne interesis diservo. Mi imagis, ke tiu fiservo estas io malserioza, sed ĉi-foje la temo estis “Pardonemo” kaj la konversacio estis kortuŝa kaj seriozega. Ni revenis per pensoj al la tragedio de Lockerbie kiu okazis en 1988, ni memoris la proprajn spertojn kaj fine venis al la konkludo, ke pardoni al tiuj kiuj vundis nin estas tre saĝa, tre bona, tre liberiga ago, nur ege malfacile atingebla praktike.

Post kafopaŭzo estis mia vico prelegi pri Zamenhof kaj Litovio kaj tuj poste sekvis tre grava programero “Anekdotoj pri David Kelso”. Mi neniam ĉeestis ion similan kaj memoro pri tiu horo restas ĉizita en mia koro por ĉiam. Mi aŭdis multajn historietojn amuzajn kaj seriozajn pri David, mi vidis ke ĉiuj ĉeestantoj vere ŝatis lin kaj ke al ĉiuj li mankas, mi sentis iom da espero ke li eble reaperos kaj ŝvebis en la aero sento, ke kie ajn li estas nun, kio ajn okazis kun li estas bele, ke ni renkontis lin en nia vivo. Mi ne rakontis miajn rememorojn pri David, ili eĉ ne estas multaj, sed ili estas ankaŭ anekdotaj, ja li estis ĉarma, sprita kaj amika... Je momento kiam ni levis la glasojn kaj ĉiuj kune prononcis lian nomon, mi havis la febreton en mia korpo, kvazaŭ por momento li reaperis inter ni kaj rigardis nin per ridetantaj okuloj dirantaj: “Jen, vidu, vi havas bonan okazon por kelkaj ĝlutoj antaŭ la lunĉo!”

Post lunĉo ni havis tre interesan ekskurson al kapeleto konstruita de ukrainaj militkaptitoj. La kapelo per si mem estas iom stranga kaj ege bunta, la familio kiu prizorgas ĝin tre unika, ĉar la virino estas ege simpatia kaj afabla dum la viro nur afabla, kaj la destino de tiuj ukrainanoj kiuj

konstruis kapelon ne povas lasi iun indiferenta. Pli ol kvarcent viroj alvenis al Skotlando en 1947 de Italio. Ili ne povis reveni al Sovetunio, pro la fakto ke ili estis kaptitaj kiel militservantoj de hitlera armeo. Ili loĝis en 40 dometoj apud Lockerbie kaj laboris, klopodis adaptiĝi al la loka komunumo kaj samtempe konservi siajn radikojn. La kapeleto, al kiu ili iom post iom transformis per sia laboremo, inventemo kaj amo simplan dometon eĉ nun ankoraŭ funkcias kaj tie okazas diservoj. Tiu ekskurseto por mi estis plaĉa ankaŭ pro tio, ke fine mi sukcesis foti multajn ŝafojn kiuj trankvile paŝtis sin en la kampoj. Kiam mi foriris al Skotlando mia kolegino diris: “Fotu iom ankaŭ la naturon, ne nur viajn esperantistojn”, do mi ĝojis ke mi povis tion fari eĉ dum tiom mallonga restado.

Post reveno mi rajtis elekti inter promeno en ĉirkaŭaĵo de urbo, posttagmeza dormeto kaj ĉeesto en salono kie okazis jarkunvenoj de EAS kaj FBCE. Ne demandu min kion tiuj literoj signifas, nek kion oni tie priparolis, ĉar mi sidis en tre komforta fotelo de antikva kaj romantika hotela ĉambro, la konversacio iris tiom trankvile, ĝentile kaj afable, ke mi fakte dormis kun malfermitaj kaj kelkfoje kun fermitaj okuloj. Mi plene vekigis en du gravaj momentoj: kiam oni parolis pri la venonta skota-brita kongreso en Edinburgh kaj kiam Laura estis persvadita eniri la estraron... :-)

La vespero estis libera kaj ni estis pli liberaj ol ni volis esti. Kun Hugh kaj Ed ni denove promenis tra urbeto serĉante konvenan trinkejon, sed preskaŭ ĉio estis fermita post la sabatnoka diboĉado. Fine ni trovis etan kaj ŝajne tipan lokon, kun kelkaj lokanoj trinkantaj, babilantaj, legantaj gazetojn kaj eĉ estis unu dormanta. Estis la momento kiam mi malkovris “Irn Bru” dank' al Hugh. Mi fakte rimarkis, ke Laura ĉiam mendas trinkaĵon senalkoholan kaj strangkoloran, sed gustumis ĝin nur je la tria tago de mia restado en Skotlando... Mi ja diris, ke homoj de mia regiono estas la plej malrapidaj de ĉiuj litovoj! Mi ricevis belegan prelegeton pri tiu trinkaĵo de Hugh kaj Ed kaj ankaŭ la gusto estis tute akceptebla. Hugh devis jam foriri hejmen, sed al ni aldoniĝis Girvan kaj la vespero iĝis aliel interesa. Ni rapide translokiĝis reen al nia hotelo por manĝi kaj havis belan eblecon paroli kun Girvan. Nekredebla laboremo de Girvan en la tradukado de “Infana raso” de W. Auld kaj aliaj liaj okupoj, lia kapablo ĝui la vivon kaj esti ĉiam optimisma, lia flua lingvo kaj interesaj temoj - ĉio tio aldone al bongusta manĝo turnis la montrilojn de la horloĝo ege rapide. Mi estis ankaŭ fascinata de la rilato inter li kaj lia edzino Maire, ĉar ĉiun

kvinan minuton li rigardis la horloĝon kaj ripetis al si mem: “Mi tre esperas, ke Maire sukcesos bone reveni”. Maire tiun tagon vizitis la maljunan onklinon en alia urbo kaj Girvan zorgis, ke ŝi ne maltrafu la buson, ke ŝi ne ekfrostu kaj ke ĉio iru bone. Mi ne scias kiom longe tiu ĉarma paro estas kune, sed vidi kiel lumiĝis liaj okuloj kiam ŝi aperis en la manĝsalono estis granda plezuro kaj iom mi eĉ enviis al ili tian akordiĝon!

La tutan vesperon ni pasigis en hotela restoracio, ĉar vetero ne allogis al promeno kaj Maire rakontis tre interese, ke en ilia komunumo en Irlando estas multaj poloj kaj litovoj. Ŝi rakontis kiel ili ĉe litova amikino Loreta festis antaŭskristnaskan vesperon laŭ la litovaj tradicioj kun dekdu specialaj pladoj kaj fojno sub la tablotuko kaj aliajn interesajn faktojn pri niaj elmigrintoj kaj vivo de ili en fremda lando. Ĉiujare elmigras amaso da litovoj. Pasintjare estis ĉirkaŭ 60 mil kaj por la popolo kiu estas nur tri milionoj tio estas multege. Se antaŭe ne ekzistis familio kie ne estu almenaŭ unu ekzilita al Siberio, nun ne ekzistas familio kie almenaŭ kelkaj ne estus en eksterlando. Por fini la vesperon Ed proponis “etan privatan seminarion” pri skotaj viskioj, ĉar tio estis la lasta vespero kaj mi ne povis reveni hejmen sen spertiĝi pri la skota unikaĵo! Mi lernis iom pri la gustoj de kontinenta kaj insula viskioj, iom pri la maniero produkti ilin, sed drinkemulino kiel mi preferus mendi Irn Bru aŭ bieron okaze de reveno al Skotlando. :-)

Dum lunda matenmanĝo ni havis ege interesan konversacion pri trajnoj kaj la ŝatokupo vojaĝi per ili, sed post lasta matenmanĝo sekvis la lasta tago, kiu estis destinita por ekskurso. La ekskurso celis al Carlisle. Por mi ne estis konvena tiu ekskurso, ĉar evidentiĝis, ke en tiu urbo la fervoja stacidomo ne havas deponejon kaj mi devus ekskursi kun mia valizo. Tiam Ed trovis solvon proponante, ke valizo restu en Lockerbie kaj ni ekskursu al Dumfries per buso. Mi volonte konsentis, ĉar nek mi vidis iam Dumfries, nek Carlisle, do kial ne vidi tion kio estas pli facile vizitebla. Kaj eĉ ne unu sekundon poste mi bedaŭris tiun elekton!

Dumfries evidentiĝis ĉarma kaj granda urbo ambaŭflanke de la rivero kaj plena da vizitendaj lokoj. Plej unue ni vizitis la centron pri Robert Burns kaj ne nur la muzeo estis interesa, ankaŭ la kunlaborantoj tie estis tre afablaj kaj servemaj. Ni spektis interesan filmon pri la poeto kaj eĉ fotiĝis kun lia figuro de vakso. La vojo laŭ rivero kun multaj pontoj gvidis nin al speciala loko - Camera Obscura. Mi konis la nomon kaj iom imagis, ke tio estas io simila al filmo, sed tute ne imagis kiom interesa estas tiu instalaĵo! Mi estis absolute ravita konsciante, ke eblas vidi urbon je reala momento,

observante aŭtojn kiuj veturas sur la stratoj, flugantajn birdojn, malfermatajn fenestrojn de la domoj... Kaj tio ĉio funkcias ekde la jaro 1836! Ni estis petitaj de la televida filmgrupo iom aktori la vizitantojn, ĉar ekzakte je la momento de nia vizito ili preparis la elsendon por novaĵoj pri la fakto, ke la Camera Obscura denove estas malfermita al la vizitantoj. Nur mi devas konfesi, ke mi nek rimarkis kiam ili filmis, nek kiam ili foriris, nek ĉu ili entute filmis – la loka junulino, kiu montris al ni urbon pere de kamerao, tre interese rakontis kaj kun mia modesta scio de angla mi devis ege atente aŭskulti kaj refoje demandi Ed ĉu mi bone komprenis. Nur nun skribante mi memoras, ke en tiu muzea turo estas ankaŭ ekspozicio pri reptilioj, sed la impresoj pri ili paliĝis post unuhora ĝuinda observado pere de la Camera Obscura.

Por iom forlavi la soifon kaj lacon ni promenis ĝis la trinkejo kiun ŝatis ankaŭ Robert Burns kaj en tiu trinkejo estis ege speciala estrino malantaŭ la verŝtablo. Ŝi estas ne plu juna, sed tre bela kaj iom antikva, kun la aranĝo de longaj haroj kiel en sesdekaj jaroj kaj mi tre volis ŝin foti. Ed ŝajnigis ke li ion demandas ĉe ŝi, mi ŝajnigis, ke mi fotas lin kaj nun mi havas foton al kiu ĉiuj reagas: “Vaŭ, kiel bela servantino!”

Post la promeno sur la dua flanko de la rivero estis tempo reveni al Lockerbie, preni rapide la valizojn kaj kuri al la stacidomo de kie trajno forveturis al Prestwick, mia lasta halto antaŭ la foriro al Litovio... Fino de mia raportejo kaj ĉu vi scivolos kial mi metis tiom impertinentan titolon al mia rakonto? Mi malkaŝos tion al tiuj kiujn mi esperas revidi dum skota-brita kongreso en Edinburgh, bone?

Mi ŝercas, ĉar mia vojaĝo per trajno al Prestwick, post mirinde agrabla 106a kongreso de Skota Esperanta asocio ankaŭ estis gaja. Ed donacis al mi mantukon kun la vortaro skota kaj mi lernetis iom en trajno kiel kion prononci. Tio multe amuzis aliajn kunvojaĝantojn kaj ĉefe gaje iĝis kiam mi kunmetis mian unuan frazon en la skota: “Silentu, idiota stultulo!” Nur mi neniel povus praktike uzi tiun frazon parolante kun skotoj, ĉar ĉiuj kiuj zorgis pri mia partopreno en la kongreso, pri veturigadoj dum la ekskursoj, teknikaĵoj dum la prelegoj, komforto kaj gustumado de diversaj trinkaĵoj kaj manĝoj, interesaj konversacioj kaj gajaj ridoj meritas nur la elkoran kaj grandan esperantan: “Dankon karaj!”

Graĵina OPULSKIENĖ

Lockerbie-Hajkoj

I

Somer' varmigas
sed plu, en morna vintro
via rideto

II

Fruajn esperojn
posttagmeza torento
eĉ... ne forviŝas

Máire McKay



Gretna Green en la pluvo dum ekskurso ĉe la Lockerbie-Kongreso

Thomas Carlyle

[Prelego de Girvan McKay, farita ĉe la nacia kongreso de EAS en Lockerbie]

La vilaĝo de Ecclefechan (“preĝejo de Sankta Fechein”) troviĝas je proksimume dek unu kilometroj sudoriente de Lockerbie. Tie naskiĝis en la jaro 1795 Thomas Carlyle*, fama skota verkisto kaj historiisto.

Li estis genia, sed ege kompleksa homo, kiu satiris multajn aspektojn de la socio en kiu li vivis. Oni ofte citas frazon, kiun li uzis por priskribi la ekonomikon, nome “la morna scienco”. Kiam li estis studento en Edinburgo, li perdis sian kristanan religion, sed la resto de lia vivo kaj lia verkado respegulas la influon de la severa skota kalvinismo. Dum la periodo de la regado de la reĝina Viktoria, multaj homoj baraktis kontraŭ la grandaj ŝanĝoj kiuj tiam minacis la socian ordon, do la skeptikismo de Carlyle igis liajn skribaĵojn tre popularaj.



Tombejo de Thomas Carlyle en Ecclefechan

Thomas Carlyle kronike suferis de gastra malsano, kiu certe kontribuis al lia reputacio kiel malbonhumora kaj malafabla homo. Li fervore dediĉis sin al la studado de la germana literaturo kaj li estis profunde influita de la germana idealismo kaj de la pensado de Nietzsche. Li tradukis verkaron de germanaj aŭtoroj, precipe de Goethe. Li verkis biografion de Schiller. Dum tiu periodo de germanaj studoj, li renkontis sian estontan edzinon Jane Baillie Welsh, kiu mem estis tre kapabla verkistino. Ili geedziĝis en la jaro 1826 (mil okcent dudek ses), kaj faris sian hejmon en domo Craigenputtock**. Jane ankaŭ havis fortan influon super Carlyle. Bedaŭrinde, ilia edziĝo estis malfeliĉa, ĉar ili ofte interkverelis, malgraŭ la fakto ke evidente estis vera korinklino inter ili. La angla satiristo Samuel Butler (kiu parenteze estis nekredanto) iam asertis: *Dio estis tre ĝentila kiam li permesis ke Carlyle kaj s-no Carlyle geedziĝu, kaj tiel malfeliĉigu nur du personojn anstataŭ kvar.*

Thomas Carlyle ne ŝatis la la realisman stilon de novelarto, do decidis disvolvi novan formon de novelo. La rezulto estis lia unua grava libro kies titolo estis *Sartor Resartus* (Esperante: “Tajloro Retajlorita”. Ĝi estas ege bizara verko, en kiu li prezentas al la publiko fikcian germanan filozofon al kiu Carlyle donis la krudan nomon *Diogenes Teufelsdröckh* (Esperante: “diegenerita diabla-fekaĵo”), supozita “Profesoro pri Ĉio”, kaj aŭtoro de libro titolita *Vestaĵo – ties origino kaj influo*. Laŭ la filozofio de Teufelsdröckh, oni devas derivi signifon de fenomenoj, kiuj konstante ŝanĝiĝas kiel vestaj manieroj. Sub la ŝajnaj absurdaj asertoj de la germana filozofa, Carlyle morde atakas la komercigadon de la brita socio, kaj la tiam modan Utilismon, kiun li precipe malamamis. Li esprimas malestimon por la korupta kondiĉo de la moderna vivo. Li progresas de tio kiun li nomas “la Eterna Nead” al la Indiferento, kaj de tio al la “Eterna Jesado”. Malantaŭ la ŝajne absurda strukturo de la libro, ĝia celo estas serioza. En *Sartor Resartus*, Carlyle koncernas sin pri socia maljusteco, ĝusta vivmaniero, kaj la plej grandaj demandoj de Fido kaj Kompreno. Grava parto de la libro estas kontraŭmilita.

La verko iĝis tre populara kaj influhava, kaj eĉ hodiaŭ havas siajn admirantojn Precipe en Nord-Ameriko (Usono kaj Kanado). Laŭraporte, la usona generalo Eisenhower kunportis ekzempleron de tiu libro dum la tuta dua monda milito, kaj iam deklaris: “Saĝa estas la homo, kiu legis ĉi tiun ĉefverkon kaj agas laŭ ties alvoko”. Aliaj gravaj libroj el la ampleksa verkaro de Carlyle inkludas jenajn: -

- *La Franca Revolucio* (trivoluma verko);
- *Frederiko la Granda* (biografio kiu estis studita kiel tekstlibroj en germanaj militaj akademioj);
- *Pri Herooj kaj la Kulto de Herooj kaj Heroaĵoj en la Historio* (en kiu Carlyle komparas diversajn heroojn: ekzemple, Napoleonon, Ŝekspiron, Danton,

- Luteron kaj Mahometon - kaj indikas ilian historian signifon.) La ideoj en ĝi influis la disvolvon de socialismo, sed iom paradokse, la disvolvo de faŝismo. Tio kredeble okazis ĉar legantoj de la skribaĵoj de Carlyle ofte trovas ilin dubasencaj aŭ dusencaj.

En kelkaj biografiaj notoj, oni asertas ke en la lastaj jaroj de la vivo de ĉi tiu alie genia kaj admirinda homo, Carlyle komencis esprimi signojn de kreskanta rasismo. Li verkis libron, nome: *Porokaza Diskurso pri la Nigrula Afero*, en kiu li defendas sklavismon. Usonanoj en la sudaj sklavposedantaj ŝtatoj entuziasme bonvenigis liajn opiniojn pri tiu afero. Tamen, eble oni devas mencii, ke antirasismo estas relative moderna disvolvo. La deknaŭa jarcento estis epoko de imperiismo, kaj blankuloj emis rigardi ĉiujn malhelhaŭtajn popolojn kiel subrasojn. Kompreneble tio ne pravigas rasisman sintenon. Plie, eble estas alia pli akceptebla interpreto. Oni povus argumenti, ke Carlyle intencis, ke tiu traktato estu komprenta kiel satira polemiko kontraŭ hipokrituloj kiuj pledas por emancipo de sklavoj en foraj landoj, sed nenion faras por la mizeruloj kaj ekspluatataj laboristoj – efektivaj sklavoj – en Britio. Se Carlyle intencis, ke ĉi tiu diskurso estu komprenita kiel satiro, eble li ne estis tute konscia pri la fakto, ke satiro estas danĝera literatura genro, kiu riskas esti prenita kiel serioza teksto.

Resume, Thomas Carlyle estis granda pensulo, kies ideoj estas gravaj ne nur por liaj samlandanoj, sed por la tuta homaro. Sendube oni povas aserti, ke liaj valoraj kvalitoj vaste superas liajn malpli laŭdindajn trajtojn.

Girvan McKay

* La nomo “Carlyle” (Caer Luguvalos) estas kelta kaj signifas “fortikaĵo de Luguvalium”. Lug aŭ Lugh estis la dio de lumo kaj genio en la kelta panteono. Tiu elemento troviĝas en multaj loknomoj en Eŭropo, ekzemple, Lugo kaj Lugones en Hispanio, Lugdunum (Lyons) en Francio, ktp. Do Carlisle ne estis angla nomo, kvankam la tiel nomata urbo nun troviĝas sude de la landlimo.

** La nomo Craigenputtock estas de kelta origino kaj signifas “roko de la akcipitridoj” (angle: “small hawks”).

CITAĴOJ EL LA VERKARO DE THOMAS CARLYLE:

- Mi ne kredas je la kolektiva saĝeco de unuopula senscio.
- Bone verkita vivo estas preskaŭ tiom malofta kiom bone pasigita vivo.
- Ĉiuj homoj, se ili ne laboras kvazaŭ observate de la granda laborestro, malbone laboros, kaj malfeliĉe laboros por si mem kaj por vi.
- Ne la ĝuo de tiaj aĵoj kiuj estas agrablaj estas malbono, sed la sklavigo de nia morala memo per ili.

Bildoj de Edinburgo

[Noto de la redaktoro: Aldonaj raportoj kaj bildoj pri la Edinburga Kongreso aperos en la venonta numero de *Esperanto en Skotlando*]

Jen mi sidas en flughaveno de Edinburgo, atendante momenton ke mi povas havi miajn paperojn kiu permesas iri al aviadilo kiu portas min al Londona flughaveno kie laŭ promesoj de la vojaĝagentejo, atendos min alia fera birdo kiu zorgos ke mi atingu Bruselon, kaj post trajna veturado, ree esti en la plej karaj el ĉiuj karaj urboj, mia Antverpeno kie mi povas paroli tiun strangan antverpenan dialekton.

Dum 3 tagoj mi partoprenis la mirinde bone organizitan kongreson de la anglaj kaj skotaj samideanoj. Kia stranga sento en fingroj kiam mi tajpas “samideanoj”. Dum la 22 jaroj kiel uzanto de Esperanto, kaj por la unua fojo en tiu verda vivo, mi partoprenis kongreson kiel libera birdo. Rolo kiujn la dioj eltrovis por mi kaj kiu montriĝas plej plaĉa al mi. Neniu persono venis al mi por plendi, kritiki, ĝemadi pri iu fuŝo. Pri lingvaĵo kiun mi ne rajtas uzi, ĉar mi reprezentas neniun asocion nek klubon. Mi reprezentas nur min, Jakvo la viro, kiu laŭ diro de brita esperantisto: “Lasas ridi la homojn”. Fine mi atingis la celon plej karan, mi estas la afabla klaŭno kiu donas bonan senton al homoj. Neniun pezan diskuton, neniun gravan parolon mi devis fari krom nur esti mi.

Homoj metis sin ĉe la tablo kie mi sidis kaj alparolis min, afable, ĝentile, respektplene kiel la britoj kutime estas. Jam vendredon la 20-an de aprilo mi povis partopreni promenadon, gvidatan de Francesco Maurelli tra la bela urbo Edinburgo. Homoj alparolis min kaj parolis kun mi pri tutnormalaj aferoj. Neniu klasbatalo okazis aŭ gravaj revolucioj, sed respekto de unu homo al alia.



Francesco Maurelli gvidas frualvenintojn

Francesco rakontis kiel la dolĉaj skotoj batalis kontraŭ malĝusto dum la historio de la lando. Pri krimuloj kaj aliaj kanajloj kiuj endanĝerigis la urban loĝantaron por fine esti punataj per malliberigo aŭ per pendumigo, ĝis morto sekvas. Pere de komuna gapado, ni lernis kie oni metis unuan frazon de la verkoj kiuj rilatas la knabo Harry Potter. Li permesis, fakte ebligis ke ni povu foti la lernejon kie Harry studis kaj evidente ni ĉiuj miris pri kastelo kiu estas konstruita sur grandega roko kiu malebligis al la malamiko eniron. Kiel bela kaj de tempo amuza estas la rakontoj el historio de senpantalonuloj.

Dum prelegoj de elokventuloj kiel István Ertl kaj la fulmrapide parolanto Martin Minich, mi sidis, povis se mi volis dormeti, aŭ serĉi pere de naztruo al la cerbo, kiu certe devas esti ie en loko de mia kapo. Kun admiro mi gapis al István kaj ĵaluzis pri lia kapablo kapti la atenton de la aŭskultantaro. Li instruis nin, la ordinaruloj, pri la agadoj en la Eŭropa Unio, mildigis dum parolo la perdon da mono el la poŝoj de la Eŭropaj civitanoj, kaj pli de tiuj nepre sciindaĵoj, kiu donas al EU pli homan vizaĝon.



Kongresmalfermo kun Majoro Jim Nicoll

Martin, siaflanke parolis pri la nanaismo. Ege atente mi devis aŭskulti por povu kompreni la mitrajlaj vortpafadoj de la juna viro kiu ne jam lernis ke prelego devas esti komprenebla ankaŭ por homoj kiuj jam pasis 60an naskiĝtagon. Parolu malpli rapide, klara dum parolo kaj vi pli kaptas atenton de la homoj kiuj nun nur klopodis elturniĝi el la amaso da vortoj kiuj fulmis en oreloj kaj perdiĝis inter zumadoj kaj aliaj sonoj pri kiu kelkaj suferas. Estas konsilo, certe ne riproĉo. Ha, ĉu necesas slangon en la gramatiko de Esperanto? Ĉu ni lernu, la plus-60-jaruloj pri vortoj kiuj havas pli longan vivon de maksimume 10 jaroj? Tamen ni subtenu la junulojn kaj akceptu la ideojn kaj kapricojn, kiel ni esperis ke la “olduloj” faru dum tempo kiam ni estis la provokemaj buboj.

Ĉu eblas havi pli belan komencon de la tago ol per promenado kun Girvan McKay en la bela parko kiu centras en Edinburgo? Kia bela viro li estas kun kiu diskuto estas gustamata kiel plej bela kaj riĉa bankedo. Por plene dorloti cerbon, necesis nur prelego de la majstro Paŭlo Gubbins. Estis kvazaŭ frandaĵo kiu fandiĝas en cerbo.

Agrabla ero en programo estis amuza kvizo lerte gvidata de Rolf Fantom, ido el la fama Esperanta familio. La ludantoj en la kvizo estis István Ertl, Martin Minich en teamo 1, kaj la nemalhavebla kaj bela Gražina Opulskienė kiu kuraĝis esti en skipo kun Jakvo. La ideo malantaŭ la kvizo ne estas testi la gimnastikan lertecon rilate scienco kaj scio, sed kapablo amuziĝi aŭskultantaro kiu parte rajtas interveni kaj helpi. Plej altan poentaron havis Martin kaj la aliaj tri kontentis per dividi saĝaj kiel ili estis, la duan lokon.

Inter prelegoj kaj promenadoj, la partoprenantoj estis dorlotataj per kafo, teo kaj kuko, kaj por feste fini la kongreson antaŭvidiĝis bankedo al kiu multaj enskribiĝis. La etoso estis bona, kaj la manĝo bongusta.



Paul Gubbins kaj Jakvo Schram ĉe bankedo

Homoj kiuj devas havi flugon al Londono, devas surviĉigi. Do kara leganto, mi iras nun kaj dum vojo mi cerbumas kaj pensas, torturas grizan amason en kapo por trovi iun kritikon kiun mi povas ĵeti en vizaĝon de amikoj Ed Robertson, Hju Rid, Clare Hunter kaj Tim Owen. Kritiko al organizado de kongreso. Jes, mi trovas kritikan eron. Kial neniam pluvas en Skotlando? Jam duan fojon mi estas en la verda lando kaj ĉiam pluvo mankas. Ĝis kaj dankon, mi konstatis ke mi fine post 22 jaroj iĝis Esperantisto, kaj ne nur uzanto de la lingvo, dum ĉi tiu kongreso.

Jakvo SCHRAM

El la redakcia rubujo

Grupo de 15-jaraĝaj knaboj diskutis pri kie ili renkontiĝu por vespermanĝi. Ili interkonsentis, ke estu en restoracio **McDonald's** apud **Captain Jack's Seafood Grill**, ĉar inter si ili posedas nur \$6, ili povas bicikli tien, kaj Jennie Webster, tiu plaĉa knabino en la klaso de Sociaj Studoj, loĝas en la sama strato, kaj eble ili vidus ŝin.

Dek jarojn pli poste, la grupo de nun 25-jaraĝuloj diskutis pri kie ili renkontiĝu por vespermanĝi. Ili interkonsentis, ke estu en restoracio **Captain Jack's Seafood Grill**, ĉar la biero estas bonpreza, la baro havas senpagajn manĝetojn, la endoma muzikistaro estas bona, ne estas aldona krompago, kaj estas multaj plaĉaj junulinoj.

Dek jarojn pli poste, 35-jaraĝaj, la grupo denove diskutis pri kie ili renkontiĝu por vespermanĝi. Ili interkonsentis, ke estu en restoracio **Captain Jack's Seafood Grill**, ĉar la biero estas bona, estas apud la sporttrejnejo, kaj se ili irus sufiĉe malfrue, ne estus tiom da kvakaĉemaj infanoj tie.

Dek jarojn pli poste, je la aĝo 45 jaroj, la grupo ankoraŭ denove diskutis pri kie ili renkontiĝu por vespermanĝi. Ili interkonsentis, ke estu en restoracio **Captain Jack's Seafood Grill**, ĉar la Martini-kokteloj estas grandaj, kaj la servistinoj surhavas striktmezuran pantalonon.

Dek jarojn pli poste, nun 55-jaraĝaj, la grupo ankoraŭ denove diskutis pri kie ili renkontiĝu por vespermanĝi. Ili interkonsentis, ke estu en restoracio **Captain Jack's Seafood Grill**, ĉar la prezoj estas modestaj, ili havas bonan vinliston, kaj manĝi fiŝon estas bone kontraŭ la kolesterolo.

Dek jarojn pli poste, je la aĝo 65 jaroj, la grupo ankoraŭ denove diskutis pri kie ili renkontiĝu por vespermanĝi. Ili interkonsentis, ke estu en restoracio **Captain Jack's Seafood Grill**, ĉar la lumado estas bona, kaj ili havas specialan prezon por frualvenintoj.

Dek jarojn pli poste, je la aĝo 75 jaroj, la grupo ankoraŭ denove diskutis pri kie ili renkontiĝu por vespermanĝi. Ili interkonsentis, ke estu en restoracio **Captain Jack's Seafood Grill**, ĉar la manĝaĵo ne estas tro spica, kaj la restoracio estas alirebla por handikapitoj.

Dek jarojn pli poste, 85-jaraĝaj, la grupo ankoraŭ denove diskutis pri kie ili renkontiĝu por vespermanĝi. Ili interkonsentis, ke estu en restoracio **Captain Jack's Seafood Grill**, ĉar ili neniam antaŭe estis tie.



Linlithgow



108a Skota Kongreso de Esperanto

La 108a (jes, tio ne estas preseraro) ĉiujara Skota Kongreso de Esperanto okazos la **7an ĝis la 10a de junio 2013** en historiĉa Linlithgow, Skotlando (inter Glasgovo kaj Edinburgo, facile atingebla trajne kaj 5 minutojn for de la grava aŭtoŝoseo M8). Festu, turismu kaj babilu kun esperantistoj el Skotlando kaj aliloke en agrabla etoso.

La kongreso inkluzivos buntan programon da prelegoj de parolantoj el eksterlande kaj Skotlando, sociumadon, manĝadon, t/drinkadon, vizitojn al interesaj lokoj kiuj ludis rolon en la skota historio, inkluzive de Linlithgow-Palaco de Maria Stuart, Reĝino de Skotoj, kaj krozon en la kanalbaseno de la Unuiĝo-Kanalo, grava komunikilo antaŭ la epoko de la fervojoj.



Linlithgow-Kanalbaseno

Pliaj detaloj kaj aliĝilo laŭgrade estos haveblaj en nia retejo: <http://www.skotlando.org/index.php/esperanto-events-eventoj>. Tamen, la provizora kongreskotizo, kiu inkluzivas la kongreson, kanalboatan ekskurson, 2 lunĉojn, vesperan bufedon, vesperan festmanĝon, kaj refreŝigaĵojn, estos ĉirkaŭ £60/€75, sed frualiĝintoj rajtas sendi antaŭpagon de £20/€25 kaj pagi la ceteron ĉe la kongreso. Neformala postkongreso okazos en la lundo, kaj detaloj aperos pli poste. Notu ke la kongreso ne inkluzivas loĝadon, kaj vi devos mem mendi tion. Listo de loĝejoj aperos en la retejo. Sendu vian antaŭpagon al la Prezidanto: **David Hannah, Tigh na Cnoc, Ardgay Hill, Ardgay, Sutherland, IV24 3DH, Skotlando**. Por pliaj demandoj, turnu vin al dhannah559@hotmail.com aŭ telefone +44 (0) 1863 766061.

Tipa skoto – plena je kontraŭdiroj:

Sir Thomas Urquhart (1711-1760)



Estis almenaŭ du grandaj Skotoj kun signifaj datrevenoj lastjare. La plej fama el la du estas la filozofo David Hume. Li naskiĝis en 1711, do estas lia 300-jariĝo. Li estis grava filozofo de klerismo, angle *the enlightenment*; modernisto, raciisto, skeptikemulo. Tamen, nun en epoko kiam tiaj ideoj ne estas tiel ikonrompaj, ne plu tiom skuas la efektivan staton de aferoj, malkiel siatempe, liaj ideoj ŝajnas hodiaŭ preskaŭ memevidentaĵoj. Pro tio, mi elektis skribi pri la alia homo, Sir (Kavaliro) Thomas Urquhart aŭ Urchart of Cromarty, kies 400-jariĝo okazis dum 2011. Li estas viro kun kiu mi profunde malkonsentas politike; aldone li estis fripono, mensoganto, kaj lasciva jupoĉasanto. Fakte, li iomete memorigas min pri antaŭa ĉefo mia, kiu ankaŭ estis altlandano. Sed antaŭ ĉio, Thomas Urquhart estis tre interesa persono, kaj plene meritas lian famon, aŭ fifamon, se vi volas.



Urquhart naskiĝis en 1611, la plej aĝa el 8 infanoj. La supra bildo montras la malgrandan havenurbon Cromarty, norde de Inverness, kaj loko de la sidejo, la kastelo de la familio. Urquhart naskiĝis apud Aberdeen tamen, kaj 11-jaraĝa eniris la Universitaton de Aberdeen, King's College, en la venonta bildo, kiel studento. Tio ne estis malkutima okazaĵo tiuepoke, tiel juna fariĝi studento. Tie li studis klasikajn lingvojn kaj matematikon. Ne estas atestaĵoj tamen, ke li fakte ricevis diplomon. Sed li studis tie dum kelkaj jaroj, kaj poste li foriris al Francio, Hispanio kaj Italio, kie li eble

partoprenis militajn kampanjojn. En 1636 li revenis al Cromarty kaj li kaj lia frato enŝlosis sian patron en la kastelo, por malhelpi ke la oldulo elspezu tiom da mono kaj akiru eĉ pli da ŝuldoj.



1639 tamen estis la komenco de periodo de granda ĥaoso en Skotlando, Irlando, kaj Anglio. Tiuj tri landoj fariĝis lastatempe la unueca posedaĵo de unusola reĝo. Sed restis tri apartaj landoj, kun malsamaj sintenoj pri religia kredo, pri la rolo de la monarĥio, pri ekonomiaj kaj politikaj rilatoj inter la landoj. Ĝi estis kaj ĝiscertagrade ankoraŭ restas tikla, paradoksa kaj ĉiam ŝanĝiĝanta batalo de ideoj kaj fortoj, eĉ ĝis hodiaŭ. Miaopinie, Urquhart troviĝis sur la malĝusta flanko, sed tiu temo meritas tutan artikolon, do mi emfazos ĉi-tie nur kio okazis pri li mem. Urquhart, estante membro de la episkopa eklezio subtenis la strebojn de la reĝo Karlo I-a maldemokratigi la protestantan religion en Skotlando, kaj Urquhart partoprenis rojalisman ribelon en la urbo Turriff en 1639. Tiu ribelo malsukcesis, kaj Urquhart fuĝis al Londono, kie la reĝo igis lin Kavaliro.

Kaj jen la komenco de la literatura kariero de Thomas Urquhart. En Londono, li publikigis sian unuan verkon, *Epigrams, Divine and Moral (Epigramoj, diaj kaj moralaj)* en 1641, kiu rivelas liajn pensojn pri la ĝusta ordo en la mondo, kaj kun sekcio laŭdante la reĝon. Unu komentanto deklaris lian verkon “senescepte sencela”. Alia diris, ke lia poezio estas “senespere prozeca”. Surprize por tia ekscentrikulo, lia verko estas banala, ĉiutaga kaj konvencia. Jen ekzemplo, *Konsolo al malriĉulo*:

*Ke vi estas malriĉa ne tro senkuraĝigu vin;
 ĉar malriĉeco protektas sekure vian domon
 Disde ŝtelistoj kaj rabistoj, kaj faras spacon por virto,
 Forigante fieron, kaj la misuzon
 De riĉeco; la pardon de ĝi, kaj la timon pri perdo,
 Troaĝojn, kaj malvirtojn kiuj endanĝerigas la sanon;
 Ĉar ili estas forŝlositaj el via domo, strebu trankviligi
 vian menson al kvieto, pli valora ol riĉeco;
 Ĉar sen riĉeco vi havos feliĉon,
 Sed nur se vi trankvilas kaj malstreĉas.*

*That you are poore, it should not much disheart you;
 For povertie securely keeps your house
 From theeves and robbers, and makes roome to vertue,
 By banishing of pride, and the abuse
 Of riches; the losse thereof, and feare of losse,
 Surfets, and vices that preiudge the health;
 Which being shut out of doores, strive to compose
 Your mind to quietnesse, more worth then wealth;
 For without wealth you may have happinesse,
 But not without tranquillitie and ease.*

En 1645 venis verko stile tre malsimila: *Trissotetras*, verko pri trigonometrio kaj geometrio. Sube troviĝas peco, sed unue mi menciuj lian trian verkon *Pantochronachanon*, de 1652. Tio estas familia geneologio de la familio Urquhart, sed ... geneologio en kiu Urquhart kronikas siajn antaŭulojn malantaŭen tra 153 generacioj ĝis Adamo kaj Eva. En la historio Urquhart faras kelkajn ekstravagancajn pretendojn: 108-oble-praavino lia, do 111 generaciojn antaŭ li, nomita Termuth, trovis Moseon inter la kanoj; 86-oble-praavino lia estis la reĝino de Ŝeba, menciita en la Biblio kaj la Korano. Alia praŭlo de Urquhart, 65-oble-praavo estis generalo de la (mita) reĝo Fergus I-a de Skotlando, kaj filino de la egale mita Reĝo Arturo same fariĝis parto de la familia linio. Oni notu, ke tiutempe Urquhart estis en prizono, do li havis kialon grandiozigi sin, por serĉi ian manieron eltiri sin de sia embarasa pozicio. Sed mi revenos al tio. Jen specimeno de la trigonometria verko *Trissotetras*, tamen. Kiel vi vidas, la intrigo estas iomete pli nepenetrebla ol en *Pantochronachanon* :

In amblygonosphericalls, which admit both of an extrinsecall and intrinsecall demission of the perpendicular, nineteen severall parts are to be considered; viz.

the perpendicular, the subtendentall, the subtendentine, two cosubtendents, the basall, the basidion, the chief segment of the base, two cobases, the double verticall, the verticall, the verticaline, two coverticalls, the next cathetopposite, the prime cathetopposite, and the two cocathetopposites.

Mi volonte tradukus, sed la plimulto de la vortoj ne troviĝas en la vortaro. En ajna vortaro, en ajna lingvo.

Matematikisto komentis: “Ĝi ne estas absoluta sensencaĵo, sed ĝi estas nededeĉifreble kunmetita”. Alia asertis: “Mi ne renkontis iun ajn kiu tralegis ĝin; fakte, mi ne konas iun ajn kiu kapablas tralegi ĝin”.

Nun ni venas al grava verko, miksaĵo de diversaj partoj: mencio pri lia projekto pri universala lingvo, pli detale kunmetita en lia pli posta verko *Logopandecteisio*; rakonto pri la skota klerulo James Crichton (1560-1582), kiu dungigis de sentaŭga mastro, kiu mortigis lin. Nu, la rakonto de Urquhart estas 99%-e fikcia, sed tra la jarcentoj, rakontoj pri lojalaj servantoj por sentaŭgaj mastroj inspirigis eĉ ĝis Kryten en la sciencfikcia televidserio *Red Dwarf*. La familia sidejo de la familio Crichton troviĝas en la urbeto Sanquhar, en la graflando de Dumfries. Alia sekcio de la libro estas dediĉita al plendoj pri la personoj al kiuj la patro de Urquhart ŝuldis monon, kaj ankaŭ kolera prediko kontraŭ pastroj de la presbitera religio, ĉar Urquhart, kompreneble, estis ano de la episkopa religio. Ambaŭ estas protestantaj eklezioj, sed por eksterlandanoj mi klarigu, ke tiam la diferenco inter la du estis analogia al la diferenco inter sunaismo kaj ŝijaismo en islamo, almenaŭ laŭ feroceco.

Aldone en ĉi tiu volumo de Urquhart estas romantika rakonto, *The Jewel, or Ekskybalaaron*, kiu enhavas, kiel vi vidas, historian momenton, la unuan seksscenen en skota literaturo:

Thus for a while their eloquence was mute, and all they spoke was but with the eye and hand, yet so persuasively, by vertue of the intermutual unlimitedness of their visotactil sensation, that each part and portion of the persons of either was obvious to the sight and touch of the persons of both; the visuriency of either, by ushering the tacturiency of both, made the attrectation of both consequent to the inspection of either. Here it was that passion was active, and action passive, they both being overcome by other, and each the conquerour. To speak of her hirquitallieny at the elevation of the pole of his microcosme, or of his luxuriousness to erect a gnomon on her horizontal dial, will perhaps be held by

some to be expressions full of obscenity, and offensive to the purity of chaste ears; yet seeing she was to be his wife, and that she could not be such without consummation of marriage, which signifieth the same thing in effect, it may be thought, as definitiones logicae verificantur in rebus, if the exercised act be lawful, that the diction which suppones it, can be of no greater transgression, unless you would call it a solacisme, or that vice in grammar which imports the copulating of the masculine with the feminine gender.

Nu, se vi povas rekoni, tra la kaŭzo da vortoj de Urquhart, ke efektive temas pri sekssceno. Mi permesos al vi deĉifri la ceteron por vi mem. Tio estas kompreneble fakultativa. Se vi ne volas legi, mi ne volas korupti vin. *Hirquitallieny*, parenteze, se vi ne sciis, signifas “hareca kiel kaprino”.

Nun, afero pli interesa por esperantistoj, la planlingva projekto de Urquhart, *Logopandekteision*. Kiel konate, kiam Zamenhof unue proponis sian lingvoprojekton al la mondo, li elmontris 16 fundamentajn regulojn aŭ ecojn de la lingvo. Urquhart proponis 66 fundamentajn ecojn, kaj asertis, ke li kapablus listigi eĉ trioble tion.

“1-e: Ne ekzistas vorto eldirebla per la buŝo de homo, kiu en ĉi tiu lingvo ne havas apartan signifon en si mem; pro tio la aserto “bliteri” de la sumulistoj validos malmulton.”

Kion tio signifas, mi ne havas la plej etan koncepton.

“2-e: Tiu, kiu atentos miajn instrukciojn, se iu stranga vorto estus proponita al ŝli, de kiuj ekzistas multaj miloj de milionoj elpenseblaj de la homa cerbo, kiuj neniam estis parolita de spirado, tiuj povos, kvankam ŝli ne scias ĝian finfinan signifon, deklari de kiu parolelemento ĝi estas; aŭ, se substantivo, al kiu situacio aŭ klaso ĝi apartenas; ĉu ĝi estas la signo de reala aŭ de imagita afero ...”

ktp, ktp. Mi ellasos kelkajn punktojn. Ni ne havas sufiĉe da tempo por lerni *Logopandekteision*, ĉion konsiderinte.

“6-e: En la kazoj de la deklinacieblaj parolelementoj, ĝi preterpasas ĉiajn ajn lingvojn: ĉar dum aliaj posedas maksimume kvin aŭ ses, ĝi havas dek, krom la nominativon. ...”

Evidente li ne konis la finnan kun 16 kazoj, kaj certe ne la tabasaranan, parolata en Dagestano kaj Azerbajĝano, kun 46.

“8-e: Ĉiu vorto kapabla je nombro havas provizon pli bonan ĉi-rilate en ĉi tiu lingvo ol en ajna alia: anstataŭ la du aŭ tri nombroj, kiujn havas aliaj, ĉi tiu provizas kvar; nome, la singularon, dualon, pluralon, kaj redualon. ...”

Kio estas la la reduala nombro, mi ne certas, sed supozeble du paroj.

“10-e: En ĉi tiu lingvo estas dek unu genroj; ĉi-rilate ĝi same superas ĉiujn aliajn lingvojn. ...”

Nu, Urquhart eraras denove. Fakte, la fula lingvo, parolata en Senegalo, havas 26 substantivajn klasojn.

“16-e: Neniu alia lingvo posedas pli ol ok aŭ naŭ parolelementojn; sed ĉi tiu havas dek du. ...”

Ĉu tio estas bona? Kelkaj pliaj ecoj:

“27-e: Tradukante versojn de iu vernakulara lingvo, ekzemple la itala, franca, hispana, slava, nederlanda, irlanda, angla, aŭ kia ajn ĝi estu, ĝi provizas la saman signifon, silabon post silabo, kaj fine de ĉiu strofo, rimon kiel en la originalo. ...”

Ho bone, speciale taŭga por la tradukado de poezio.

“31-e: Nomante stelojn, ĝi provizas la plejeblan signifoplenan manieron imageblan: ĉar per unusola vorto vi scios la magnitudon, kune kun la longitudon kaj latitudon, kaj en gradoj kaj en minutoj de la stelo esprimita en ĝi. ...”

Sed ne tre taŭga por la rapida tradukado de astronomio. Ekzistas unu pli posta planlingvo kiu havis tiun skemon por nomi stelojn en la kosmo, kaj urbojn surtere. Ĝi nomiĝis *Lingualumina*, la lingvo de lumo, de Frederic Dyer, kaj en la teksto, li donas ekzemplon de urbo nomata laŭ latitudo kaj longitudo. Mi provis trovi sur la mapo. Tiu tiel-nomata “urbo” fakte troviĝus ie en la maro proksimume 150 km de la ĉefinsulo de la Filipinoj, Luzon. Do, sufiĉe malrapida nomadsistemo por ke eĉ la aŭtoro de la projekto kontrolus siajn tradukaĵojn laŭ tiu genia skemo. Dyer pli poste fariĝis idisto.

“48-e: El ĉiuj lingvoj, ĉi tiu estas la plej enhava lingvo rilate komplimentojn, kaj do plej taŭga por kortumanoj kaj sinjorinoj. ...”

Grava afero. Por Urquhart.

Sed la plej grava eco, mia opinie, estas facileco, kaj el la 66 ecoj, mi elektus la jenan:


“57-e: La plej granda mirindaĵo el ĉiuj estas, ke el ĉiuj lingvoj de la mondo ĝi estas la plej facile lernebla; knabo 10-jaraĝa kapablas akiri la scion ene de tri monatoj; ĉar en ĝi estas multaj faciligoj por la memoro, kiujn nenia alia lingvo posedas krom ĝi mem. ...”

Tamen, Esperanto atutos vin, S-ro Urquhart. Zamenhof pretendis DUONHORON. Sed rilate nombron de pretendoj, Urquhart superas al Zamenhof. Ni vidis multajn pretendojn, sed neniom da detaloj. Sendube vi atendas senpacience tiujn detalojn. Tamen ili ne ekzistas. Urquhart pretendis, ke li ja ellaboris detalan vortaron, sed tragedie, li perdis ĝin dum la batalo de Worcester. Domaĝe. Sed verdire, la planlingva propono de Urquhart estas senenhava; ĝi konsistas nur el pretendoj.

Nun al la unusola projekto de Urquhart kiu havas literaturon meriton, lia traduko de la plejmulto de la ĉefverko de François Rabelais, kiu vivis 1494 – 1553, franca verkisto, renesanca humanisto kaj aŭtoro de fantazia,



satira, groteska kaj maldeca verkaro pri la giganto Gargantua kaj lia filo Pantagruel. Urquhart publikigis du volumojn de lia traduko en 1653. La cetero restis nefinita kaj Pierre Antoine Motteux finis ĝin post la morto de Urquhart.





Ĝi estas kompetenta traduko, sed ĝi estas de Urquhart. Ekzemple, lia teksto estas 70000 vortojn pli longa ol la originalo. Kiam Rabelais mencias 9 diversajn bestoblekojn, Urquhart tradukas per 71. Sed sufiĉe aprobinda fina verko en lia literatura kariero.

Do ni resumu la finajn eventojn en la vivo de Thomas Urquhart: Li fuĝis en 1642 pro la ŝuldoj de lia patro. Rondvojaĝis Europon. Revenis al Britio en 1645. Denove li aktivis kontraŭ la skota registaro kaj eklezio, kaj partoprenis rojalisman ribelon en Inverness en 1648. Deklarita perfidulo, sed ŝajne ne tro suferis rezulte. Sed 2 jarojn pli poste okazis la decida batalo de Worcester en sud-okcidento de Anglio en 1650. La monarĥista flanko suferis gravan malvenkon. Urquhart kaptiĝis kaj oni enprizonigis lin. Pro tio la ekstravaganca genealogia verko, por igi lin pli grava ol li

vere estis. Sed tio donis al li tempon por publikigi liajn ĉefverkojn. La Cromwell-a registaro ellasis lin de la prizono, sub kondiĉo, ke li iros al alia lando, kaj li elmigris denove en 1653, kaj li loĝis en ekzilo.

Fine, Urquhart mortis en 1660, laŭdire en apopleksio de ridado, kiam li aŭdis ke oni restaŭris la monarhion en Anglio. La vivo de tipa fama Skoto - plena je kontraŭdiroj. Aŭ ĉu ĉio?



Tio ne estas la fino de Thomas Urquhart, tamen. Li aperas denove, fikcie, en rakonto en *Unlikely Stories, Mostly* (*Neverŝajnaj Rakontoj, Plejparte*) de Alasdair Gray, kaj en tre rekomendinda romano de Andrew Drummond, *A Hand-book of Volapük* (*Manlibro de Volapuko*), kie Urquhart reviviĝas por ŝajne helpi la malrektan S-ron Justice, ĉefo de la edinburga volapuk-movado en lia ĝismorta lukto kontraŭ la fiaj esperantistoj. Urquhart, kompreneble trompas la volapukistojn, sed mi ne rivelos la konkludon. Mi ege rekomendas la libron.

Do, taŭga fino al memorinda ekscentrikulo.

Ed ROBERTSON

Abonilo

ESPERANTO-ASOCIO DE SKOTLANDO (EAS)

Kotizo al EAS kaj abono al Esperanto en Skotlando por 2012:

Dankon pro via ĝisnuna fidela subteno. La jarabono komenciĝas en januaro ĉiujare. Plene pagitaj membroj de **EAS** ricevas **Esperanto en Skotlando** kaj la **Scottish Esperanto Bulletin** senpage. Sendu al vian kotizon al:

Mia Casey, 9 Flora Gardens, Bishopbriggs, Glasgow, G64 1DS
(miacasey@ntlworld.com)



Elektu kaj indiku la kategorion :

Kotizo al EAS kaj senpage ricevo de la gazetoj	£10/€12
Ne-membro en Britio kiu abonas nur al EeS	£6/€8
Ne-membro en alia lando	£10/€12
Ekstra jarabono de EeS al la sama adreso	£5/€6
Studento	senpage

Donaco al **Esperanto-Asocio de Skotlando**

£/€

Totala sumo

£/€

Nomo

Adreso

Poŝtkodo

Telefono

Retpoŝtadreso

Mi preferas ricevi mian kopion de **EeS** kiel PDF-dosieron (ne papere): Jes/Ne

Resendu ĉi tiun folion (aŭ kopion), kune kun via pago. Se pagante per £ pagu ĉeke al la adreso supre. Ĉekoj estu pagendaj al: **Scottish Esperanto Association**. Alternative vi povas transsendi pagon aŭ eĉ regulan pagon en nian bankokonton:

Bank of Scotland, Sort Code 80-05-64, Account Number 00871939

aŭ pagi per € vi en nian UEA-konton **eask-l**. Ambaŭkaze sendu al ni la formularon, aŭ sciigu al ni retpoŝte, indikante per kiu maniero vi pagis. Bonvolu noti ke kvitancoj ne sendiĝos ĝis la sekvanta numero de **Esperanto en Skotlando** eldoniĝos.

John Francis (1924-2012)

[Adaptita de omaĝoparolo prezentita la 17an de majo al "Ours Club" en "Glasgow Art Club"]

Mi parolos ĉi-vespere pri karmemora John Francis. Ni memoras lin ne nur kare kiel persona, kion ni ja faras, sed ankaŭ kiel unu el la plej elstaraj aŭtoroj de la esperanta mondo.

Lia plej bona lerneja amiko, William Auld, poste fariĝis la plej granda Esperanto-poeto de la pasintaj kvindek jaroj, kaj estis li kiu konvinkis John lerni Esperanton. John volis lerni la Hispanan, pro la vakeraĵoj romanoj kiujn li fanatike legis kiel junulo. Li provis persvadi Auld ankaŭ lerni ĝin. Auld konsentis, kondiĉe ke John unue lernu Esperanton. John plenumis sian parton de la kontrakto, sed ni ne scias ĉu Auld sian! Tamen, lerninte Esperanton, John fariĝis unu el ĝiaj grandaj lumuloj. Ne estas troige diri ke li ŝultrumas kun la Ŝekspiroj de la esperanta mondo. John Francis plene regis la literaturan, kreaĵoj kaj espriman povon de Esperanto.

Kaj John kaj William Auld servis en la flugarmeo dum la dua mondmilito, sed aparte. Poste ilia amikeco reflamiĝis kiam ili kunvenis kun du aliaj Esperanto-poetoj, John Dinwoodie kaj Reto Rossetti, por verki poezion kiu finfine eldoniĝos en la influega libro "Kvaropo". La kontribuo de John al ĝi estis unuopa longa poemo en kvin ĉapitroj, "La Kosmo", kovranta dudek kvin paĝojn.

"La Kosmo" priskribas en versoj la originon de la Universo ekde "vakua firmamento" tra la naskoj de steloj kaj galaksioj, la formado de planedoj, la evoluo de vivo, kondukanta al la domino de homoj, ĝis la neevitebla morto de nia suno kaj la Universo mem. La poema ciklo finiĝas per la sama linio kiu malfermas ĝin "senvive sin etendas vakua firmamento". Tiu ĉi poemo debutis John en la literaturan scenejon.

John iam priskribis al mi kiel li, William Auld kaj Reto Rossetti, kunvenus semajnfine en la domo de Rossetti en Troon, por paroli pri poezio, pri la

lingvo Esperanto, kaj elprovi ideojn unuj je la aliaj. Ili regule maldormus la tutan nokton pro la diskutoj, fumantaj kaj trinkantaj kafon por subteni sin ĝis mateno. Tia estas la dediĉo kiu formas iun de la literatura staturo de John Francis. Tia dediĉo kulminis en “Kvaropo”.

John komencis verki prozojn kaj en 1960 li eldonis “Vitralon”, kolekto de vaste malsimilaj rakontoj – tiel vitralo – iuj el ili akre satiraj kaj lokigitaj en fantazia lando, Juglando, kaj ĝia najbaro, Ruz – John posedis spriton! Unu rakonto, “La Tuŝo de Morto” okazanta en la reala mondo, ĉerpas el lia sperto kiel pafilisto en bombaviadilo dum la dua mondmilito. Ĝi enhavas detalojn kiuj povas veni nur de veraj spertoj. Ekzemple, li priskribas kiel, kiam pafilista tureto flanken turniĝas, la dorso ne plu estas kovrita de la aviadila ŝelo. La nura aĵo inter la pafilisto kaj la ekstero estas la maldika ŝtala de la pordo, kiun li povas senti batiĝi de la ekstera aerfluo.

En 1982 li eldonis “Misio sen Alveno”, tre ĝuinda sciencfickia aventuro kiu, kiel oni atendus de tia kapabla aŭtoro, traktas, en la fikcia kunteksto de la rakonto, multajn misterojn de la homa kondiĉo. Tio estas por diri ke ĝi enhavas literaturan valoron aldone al plezura.

En 1997 li eldonis “Tri Rakontoj pri la Miljara Paco”, sprita politika fantaziaĵo, en kiu li revizitas Juglandon kaj Ruz. Ili estas senkompataj satiroj pri tio, kion John plej malamis: la trompemon de politikistoj kaj socian maljustecon.

John iam diris al mi ke ĝenis lin ke, dum ekzistis originalaj romanoj en Esperanto por plenkreskuloj kaj ankaŭ por junaj infanoj, ne estas iuj por malpli junaj infanoj kaj junaj dekelkjaruloj. Do, li simpe ekverkis, kaj en 2004 “La Kastelo de Vitro” eldoniĝis. Ĝi estas magia fantazia aventuro en paralela mondo. Estas omaĝe al John kiel aŭtoro, ke lia mastreco kovris tiom da ĝenroj tiel sukcese. Dum diskuto pri la libro mi iam diris al li ke la scenoj en la paralela mondo ŝajnis iomete tro perfektaj. Li respondis, ke jes, tio estis lia intenco. Krom ke mi sentis min iom stulta, mi pensis ke tio estas atesto pri lia kapablo, ke li sukcesis la ŝajnon de troa perfekteco sen tio ke la leganto rimarku la literaturajn trukojn kiujn li uzis.

Lia libro “Kronprincedzino” estas ĵus eldonita de FEL. Mi ne povas diri ion, ĉar mi ankoraŭ ne legis ĝin!

Lia majstroverko “La Granda Kaldrono” estis eldonita en 1978. La romano traktas la vivojn de du glasgovaj familioj dum du generacioj, de antaŭ la unua ĝis post la dua mondmilitoj. Ĝi estas bele verkita kaj plene ĝuinda fikciaĵo. John montras profundan komprenon de la homa koro, de la deziroj kaj bezonoj kiuj motivigas nin fari kion ni faras, kaj faras nin kiaj ni estas; de la ekscititaj ĝenetoj de juna virino kiu elektadas vestojn por sia unua amrenkonto, al la ofera rifuzo de soldato en la tranĉeoj akcepti promocion kiu savus lin de morto sub la malamika pafado. Denove, John ĉerpas el sia propra milita sperto en ĉapitro kie juna lernanta piloto fluganta en Kanado perdiĝas en monta tereno dum nuboj descendas. Post ronda cencela flugado en kreskanta mortotimo li finfine surteriĝas ĉe aerodromo multajn mejlojn for de lia baza. John iam diris al mi ke li enmetis tiun ĉapitron kiel metaforon por la senceleco de la vivo – ripetaj rondiroj en cirkloj – kiu estis efektive la ĉefa temo de lia *Grande Oeuvre*.

Lia antaŭlasta verko esti eldonita aperis en aprilo ĉi-jare far Esperanto-Asocio de Skotlando. Ĝi estas poemkolekto. Iuj poemoj estas jam eldonitaj aliloke, sed sufiĉa nombro ne estas antaŭe eldonitaj. Inter ili estas gemo, “La Kosmo (reviziita)”. Ĝi konsistas el eta poemo de unu strofo, sekvata de dua, en respondo, ankaŭ konsistanta nur de unu strofo. Mi opinias ke tio ĉi montras lian spritosenton, per moko de la aroganto kaj parademo de sia propra juneco – kvinĉapitra poemo, dudek kvin paĝojn longa, reviziita kiel unu strofo el ses vortoj!

John estis bone konata inter Esperantistoj internacie, ofte ĉeestantaj Universalajn Kongresojn. Dum multaj jaroj, tamen, li entute ne aktivis en la movado ĝis 2004, kiam preskaŭ senanoncite, lia ekaperis en la Glasgow Esperanto Society. Kvankam retirema, tiuj kiuj ekkonis lin, trovis lin esti viro profunde homa, kompatema kaj amuza.

Estas malĝojige ke iu, kies kompanio estis tiel bona, estas nun for. Sed, almenaŭ por Esperantistoj, li postlasis en sia verkaro heredaĵon vere ĝojigan. Do en la nomoj de ĉiuj Esperantistoj, mi volas danki al vi pro viaj donacoj de via vivo kaj literaturo, John Francis, karmemora.

Hju RID

Jack Casey (1931-2011)

La 11an de aŭgusto 2011 Jack Casey, tre ŝatata kaj alte estimata ano de Esperanto-Asocio de Skotlando kaj dum multaj jaroj kasisto de la Esperanta Asocio de Skotlando kaj sekretario de la Glasgova Esperanto-Asocio, forpasis post longa malsano. Li estis 80-jaraĝa. Jack estis tre inspira ano de la movado en Skotlando. Lia ĉiama pozitiva kaj kuraĝiga sinteno dum ĉiuj el niaj kongresoj, studrondoj, kaj klubaj kunvenoj dissendis ĝojigan lumon al ĉiuj kiuj estis en lia apudeco. Li estis preta konversacii kun ĉiuj, kaj li nepre parolis inteligente kaj bone informite pri vasta gamo de temoj. Tia sinteno markis ankaŭ lian profesian kaj familian vivon.

Signo de lia bonhumuro aŭdiĝis en tio ke la de li elektita bonveniga muziko por liaj funebrantoj estis ĉerpaĵoj el lia ege ŝatata ĵazmuziko, kaj en la “himno”, kiun ni ĉiuj kantis, la glasgovecega amuzkanto, “The Jeely Piece Song”. Tia estis Jack. Ĉiu en la skota Movado kaj multaj en la brita spertis propran unikan rilaton kun Jack, kaj verŝajne neniu el tiuj ne sentis sin pliriĉigita pro tio ke tiuj konis lin. Li estis forte inteligenta, bonkora kaj kuraĝa viro, ĝentilhomino en ĉiu senco de la vorto, kiu klare amis pleje la gravajn aferojn de la vivo.

Jack naskiĝis la 27an de februaro 1931 en strato Inglis, Glasgovo, en unuĉambra apartamento havanta dividatan eksteran necesejon. Tiutempe la stratlampaj estis gasaj. Tia apartamento tiutempe nomiĝis angle “single end”, plej baza loĝloko en la urbego, sed nuntempe tia vendiĝas kontraŭ multaj miloj kiel “studio-apartamento”. En 1941 komenciĝis la Blitzo. Post la unua bombardo la gepatroj pakis kelkajn valizojn kaj per aŭtobuso vojaĝis al la urbo Lanark en la kamparo. En la strato la patrino de Jack ekdemandis al virino kiu butikumis ĉu ŝi akceptus rifuĝintojn. Ŝi respondis jese kaj la patrino kaj knaboj restis tie dum naŭ monatoj.

Ree en Glasgovo, Jack aliĝis al la bazlernejo de Dennistoun, kaj post al la mezlernejo Whitehall kie li estis inteligenta kaj kapabla studento. Poste li studis konstru-inĝenierarton. Li estis la nura homo el tiu distrikto kiu aliĝis al universitato, pri kio tre fieris la gepatroj. Dum la longaj someraj ferioj Jack gajnis multan praktikan sperton kiel dungito de la firmao Robert McAlpine: dum la unua somero ĉe Lago Long, dum la dua en Stoke-on-Trent, dum la tria en Rochester. Ne ĉio temis pri laboro kaj li lernis Esperanton, glisil-flugadon, mont-grimpadon, globludadon kaj bilardon. Li ankaŭ konatiĝis kun usona muziko specife Sinatra kaj Ella kaj Bobby Darin.

En 1953 Jack komencis sian karieron kiel konstru-inĝeniero en la firmao James Williamson & Partners. Li laboris super pluraj centraloj kaj hidroelektraj baraĵoj. Precipe li helpis termezuri la centralon de Kincardine, kaj per tiuj desegnoj fariĝis ano de la Instituto de Konstru-Inĝenieroj. Li laboris ĝis 1969 en pluraj inĝenieraj firmaoj en Glasgovo kaj Edinburgo, servanta dum du jaroj en la flugarmeo kiun li forlasis kiel fluga oficiro. Post tio lia kariero ŝanĝiĝis kiam li fariĝis lektoro unue en la kolegio Stow kaj poste en Glasgow Caledonian University.

Li estis tre ŝatata inter la studentaro ĉar li donis libere sian tempon al studentoj. Li estis konata kiel unu el la plej bone preparitaj lektoroj en la kolegio. Li ankaŭ famis pro tio ke li mem fortirus malĉeestantajn studentojn el la kolegia trinkejo, ĉar li estis tia homo kiu ne tolerus sendisciplinon nek povus kompreni tiujn al kiuj mankas la sindediĉo kiun li posedis. La studentoj respektis lin, malgraŭ la bedaŭro pro la forlasita biero!

En 1963, kun esperanto-amiko Ian Davidson, Jack tradukis plurajn skotajn kaj irlandajn folklorajn kantojn en Esperanton. Kune kun tri knabinoj ili iris al kongreso en norda Bulgario. Antaŭ ol prezenti kantojn dum la internacia vespero Jack dormetis. Vekis lin, por demandi ĉu ŝia teatra grupo povus aperi antaŭ lia kanta grupo, Mia Zupanič. Tio estis la unua fojo kiam Jack renkontis sian estontan edzinon, kaj ne povis ne kaptiĝi de ŝia beleco.

La duan fojon ili renkontiĝis dum Universala Kongreso en Sofia. Post vespero de dancado Jack proponis al Mia akompani ŝin al ŝia loĝejo. Kiam ŝi malkovris ke li loĝis en la mala direkto ŝi ne akceptis lian proponon. Jack intepretis tion kiel ĝentilan rifuzon. Post la kongreso Jack akceptis inviton far hungara Esperantisto ĉeesti plian renkontiĝon ĉe la apudmara esperanta kampadejo en Primošten. Kiam ili deboatiĝis, renkontis ilin grupeto de zagrebaj Esperantistoj. Inter ili – nu, triafoja bonŝanco – estis Mia. La juna geparo enamiĝis kaj post du jaroj geedziĝis en 1965. Ĉar tiam la nura komuna lingvo inter ili estis Esperanto, geedzigis ilin Pastro Hugh Martin, tute per la lingvo Esperanto.

Ili setlis en Bishopbriggs kie kreskis ilia familio de du filoj, Kevin kaj Alan. Jack estis kiel amiko al la filoj aldone al esti patro. Li kuraĝigis ilin sekvi siajn interesojn, parolis kun ili sciohave pri ĉiaj temoj, kaj estis bona aŭskultanto, preta vidi iliajn vidpunktojn. Poste estis granda ĝojo por Jack fariĝi avo je la infanoj de Alan: Nicole, Lara, Sean kaj Ana. Post sia emeritiĝo, Jack daŭre kaj energie kontribuis al la skota movado per prelegoj en kongresoj, gvidadoj de diskutoj en studrondo, kaj kiel sekretario de la glasgova klubo ĝis jaro antaŭ lia morto. Li mankos ne nur al sia familio sed ankaŭ al la Esperantistoj kiuj konis kaj amis lin.

Hju RID

Kalendaro



8. septembro 2012: EAS Sabat-Rondo en Glasgow Quaker Meeting House, 38 Elmbank Crescent, Glasgow G2 4PS 10:00-17:00. Interesaj ekzercoj, ludoj kaj kvizoj por plibonigi vian konon de la internacia lingvo. Plia informo: Hugh Reid hju_rid@yahoo.co.uk

17. - 18. novembro 2012: 24a Eŭropa-Rendevuo en Stella-Plage, apud Le Touquet-Paris-Plage, Francio. Ĝuu Esperanto-etoson en la plej eleganta banloko de norda Francio (facile atingebla, ne for de Calais). Manĝoj, tranoktado kaj bunta programo kontraŭ nur 85 €. Deŝutebla aliĝilo: http://esperanto.nord.online.fr/doc/STELLA-2012_alighilo.pdf

23. - 25. novembro 2012: Drondo (diskutrondo) estas semajnfina kurso por progresintoj en la Adelphi Hotel en Liverpool. Subvenciata kosto £80 por ĉio krom lunĉoj: programo, tranoktadoj kaj intereseĝaj diskutoj! Por mendi, kontaktu la oficejon de EAB: <http://esperanto.org.uk/eab/contact.htm>

24. novembro 2012: EAS Zamenhof-festkunveno en la Episcopal Church Hall (Holy Trinity) Avon Street, Motherwell (proksime al la fervoja stacidomo) 14:00 - 16:30. Temoj (interalie): "Islando kaj Esperanto" anticipanta la 98an UK en Reykjavik. Ni lunĉos en la apuda Bentley Hotel en High Road je la 12:30a.

9. - 16. marto 2013: Mediteranea Esperanto-Semajno - 2013 en Lazura Marbordo, St. Raphael, Residence Val d'Esquière, Les Issambres, Francio. Venu al la Mediteranea Maro, kie floras mimozoj kaj migdalarboj. Amika, familia etoso, belegaj pejzaĝoj, bona ripozo kaj lazura maro! Plia informo : Monique Prezioso prezmoni@hotmail.com

29. aprilo - 9. majo 2013: 25-a Aroma Jalta. Belega ekzotika naturo de la Krimea duoninsulo en Ukrainio, altaj montoj, senlima Nigra maro, florantaj kreskaĵoj, historiaj kaj naturaj vidindaĵoj inspiras vian animon kaj iĝos neforgesebla evento de la jaro. Pliaj detaloj kaj aliĝilo: <http://aromajalto.ukrainio.org.ua/home>.

10. - 12. majo 2013: 94a Brita Kongreso de Esperanto en Ramsgate, Kent. Interesa programo planata, inkluzive de ekskurso al Oostende en Belgio. Pliaj detaloj aperos en la retejo: <http://www.britakongreso.org/>

17. - 20. majo 2013: 90a Germana Esperanto-Kongreso en Nürnberg, Germanio. Kongreso de Germana Esperanto-Asocio kaj festo okaze de la 125a jubileo de la Nurenberga Esperanto-grupo. Pliaj detaloj kaj aliĝilo: <http://www.esperanto-nuernberg.de/e/eo/290828/main/gekextern>

7. - 10. junio 2013: 108a Skota Kongreso de Esperanto en histoririĉa Linlithgow, West Lothian, naskiĝejo de Maria Stuart. Vidu p. 27 de ĉi tiu numero de *Esperanto en Skotlando*. Pliaj detaloj: <http://www.skotlando.org/index.php/esperanto-events-eventoj> aŭ de David Hannah: dhannah559@hotmail.com

20. - 27. julio 2013: 98a Universala Kongreso de Esperanto en Reykjavik, Islando. Pliaj detaloj aperos ĉe: <http://www.uea.org/kongresoj/index.html>

3. - 10. aŭgusto 2013: 80a Itala Kongreso de Esperanto en Castellaro, apud San Remo, Italio. Venu kaj spertu la belan etoson ĉe la plej populara eŭropa landa kongreso de Esperanto. Plia informo: <http://italakongreso.esperantoitalia.it/>

POR PLI DA EVENTOJ, VIDU: <http://www.eventoj.hu/kalendar.htm>